



EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

9  
1972




Alte tenante tabulon kun surskribo de Prezidanto Maŭ "disvolvu sportajn aktivadojn kaj plifortigu la fizikan kvaliton de la popolo", junulinoj marŝas en la stadionon.





Prezidanto Ma ŭ kore manpremas kun Ĉefministro Sirimavo Bandaranaike kaj esprimis al ŝi sian varman bonvenigon.



Dong Bivu, la aganta prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko kaj Ĝou Enlaj, ĉefministro de la Ŝtata Konsilo, kaj aliaj gvidantoj de nia ŝtato intervidiĝis kun Sirimavo Bandaranaike kaj ŝia sekvantaro. La foto estas farita dum la intervidiĝo.

# Vizito de la Ĉefministro de Sri-Lankao S-ino Sirimavo Bandaranaike al Ĉinio

De la 24-a de junio ĝis la 5-a de julio de 1972, la ĉefministro de la Respubliko de Sri-Lankao S-ino Sirimavo Bandaranaike faris ŝtatan viziton al la Ĉina Popola Respubliko, laŭ la invito de la ĉina registaro.

Dum la vizitado de Ĉefministro Sirimavo Bandaranaike, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong intervidiĝis kun ŝi kaj faris kun ŝi koran amikan interparolon. Ankaŭ Dong Bivu, la aganta prezidanto de la





Ĉina Popola Respubliko kaj ĝia vicprezidanto Song Kingling respektive intervidiĝis kun ŝi.

Dum sia restado en Ĉinio, la ĉefministro de Sri-Lankao kaj ŝiaj sekvantoj vizitis la urbojn Pekino, Ŝenjang, Dalian kaj Ŝanhajo kaj pririgardis popolajn komunumojn, fabrikojn, akvoutiligajn konstruaĵojn kaj famajn pitoreskejojn kaj historiajn lokojn. Ĉie ili ricevis varman akceptadon de la ĉina popolo.

Dum la vizitado de Ĉefministro Sirimavo Bandaranaike, Ĉefministro Ĝou Enlaj faris kun ŝi interparolojn en amika, sincera kaj malkaŝema atmosfero kaj publikigis komunan komunikon.

La vizito de la ĉefministro de Sri-Lankao Sirimavo Bandaranaike al Ĉinio faris gravan kontribuon por plifortigi la rilatojn de amikeco kaj kunlaboro inter Ĉinio kaj Sri-Lankao kaj antaŭenpuŝi la aferon de unuigo de la aziaj kaj afrikaj popoloj por batali kontraŭ imperiismo.

Song Kingling, vicprezidanto de la Ĉina Popola Respubliko, intervidiĝis kun Ĉefministro Sirimavo Bandaranaike. La foto estas farita dum la intervidiĝo.





Ĉefministro Sirimavo Bandaranaike donacas al la ĉinaj infanoj la elefantidon Mithura.







Ĉefministro Sirimavo Bandaranaike kaj ŝia sekvantaro vizitas la Pekinan Medikamentan Fabrikon.



Ĉefministro Sirimavo Bandaranaike kun geaktoj de la Ĉina Baleda Trupo en arta vesperkunveno en Pekino



Ĉefministro Sirimavo Bandaranaike vizitas la polan komunumon Sigiking en antaŭurbo de Pekino.

Varma bonvenigo al Ĉefministro Sirimavo Bandaranaike





# Unuiĝo, Konkurso kaj Progreso

— Pri la Tutlanda Pilkluda Turniro

**D**E la 9-a de junio ĝis la 2-a de julio 1972, okazis en Pekino kaj aliaj kvin urboj la Tutlanda Pilkluda Turniro de korbopilko, volebalo, piedpilko, tabloteniso kaj volano. Ĝi estis la unua landskala sportkunveno de post la Granda Proletara Kultura Revolucio, manifestis la viglan disvolviĝon de nia fizikkultura fronto hardita en la revolucio kaj montris la tute novan spiritan fizionomion de niaj sportistoj. La turniro plene enkorpiĝis la brilan


penson de la surskribo de Prezidanto Maŭ “**disvolvu sportajn aktivadojn kaj plifortigu la fizikan kvaliton de la popolo**”.

## EL AMASOJ KAJ AL AMASOJ

En la pasintaj pli ol 20 jaroj, sub la direktado de la supre menciita instruo de Prezidanto Maŭ, nia sporta afero havis grandan disvolviĝon. La liberigi-

*Kapto de danĝera pilko*





*Korbopilka maĉo inter la ŝanhaja kaj henan-a teamoj*

taj diversnaciecaj popolanoj fariĝis mastroj de sportado. 2956 gesportistoj (inkluzive 1056 sportistinojn) partoprenintaj la turniron estis elektitaj de milionoj da sportaj aktivuloj sur diversaj frontoj de konstruado kaj defendado de la patrolando. Ĉiuj regionoj, de la bordo de la Orienta Maro ĝis Pamiro-altebenejo, de kaŭĉukaj kultivejoj de Hajnan-insulo ĝis la vasta herbejo de la Interna Mongolio, havis siajn partoprenantojn al la turniro, kiuj apartenas al hana, huja, korea, mongola, tibeta, ujgura, jia, ĝuanga, manĉua, baja, naŝia, salaa, siboa kaj tatara nacioj.

La sporta aktivado de la vastaj amasoj estas ne-elĉerpebla fonto por vigle disvolvi nian sportan

aferon. La turniron partoprenis 286 viraj kaj virinaj teamoj el ĉiuj provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj urboj rekte sub la centra registaro kaj ĈPLA. En la Dua Tutlanda Sportkunveno okazigita en 1956, Tibeto ne havis tablotenisiston por partopreni la konkurson. Ĉifoje, ĝi sendis sian tablotenisan teamon, kiu estas la plej juna en la turniro. Ĝiaj anoj meznombre aĝas je 14 jaroj.

Por pli bone plenumi la principon, ke sporto servu al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj pliapaŝe antaŭenpuŝi amasan sportan aktivadon, multaj maĉoj prenis lokon en fabrikoj, minejoj, komunumoj, trupoj kaj lernejoj en la ses konkursoj urboj. En Pekino oni aranĝis preskaŭ 200 maĉojn en pli ol 50 bazaj unuoj.

La ludejo, lumigilo kaj aliaj kondiĉoj de bazaj unuoj estas malpli bonaj ol tiuj en publikaj sportejoj. Se pluvis, ventis aŭ brulis la suno, sportistoj renkontis ankoraŭ pli grandajn malfacilojn. Tamen ili ne nur serioze traktis ĉiun maĉon okazigitan en bazaj unuoj kaj montris bonajn sportistan moralon kaj arton, sed ankaŭ iniciate faris pilkan prezentadon kaj fervore helpis tieajn amatorojn en ludado utiligante liberan tempon antaŭ kaj post la konkurso. Ilia faro ricevis aplaŭdon de la vastaj amasoj.

## **AMIKECO LA UNUA, KONKURSO LA DUA**

Tuj post la komenco de la piedpilka konkurso en Pekino, la tibeta piedpilka teamo konsistanta ĉefe el tibetanoj kaj hujoj renkontiĝis kun la ŝanhaja teamo. La tibeta teamo estas unuafoje partoprenanta konkurson, dum la ŝanhaja teamo estis forta kaj sperta.

Kiam la tibeta teamo estis okazigonta preparan kunvenon antaŭ la konkurso, venis al ili la estro kaj trejnisto de la ŝanhaja teamo. La alvenantoj sincere proponis, ke por efektiviĝi la revolucion fizikkulturan linion de Prezidanto Maŭ kaj popularigi la sportan aktivadon kaj altigi ĝian nivelon, ambaŭ teamoj kune preparu kaj bone faru la konkurson. Sekve, la du teamoj respektive prezentis siajn lertaĵojn kaj mankojn, la aplikotajn taktikojn kaj sincere esperis, ke la rivalo donu helpon por plibonigi la teknikon.

Tibeto sur la "firsto de la Mondo" kaj Ŝanhajo ĉe la bordo de la Orienta Maro distancas inter si je miloj da kilometroj, tamen la komuna celo firme unuigis la sportistojn de ambaŭ teamoj. Antaŭ



la konkurso, rompante la ĝeneralan kutimon la ambaŭteamaj sportistoj kune sin ekzercis. En la unua maĉo la tibeta teamo ne enpafis golon. Dum la paŭzo la trejnisto de la ŝanhaja teamo fervore donis al ili konsilon kaj kuraĝigis ilin intensigi sian atakon. La tibeta teamo rigardis la konkurson kun forta teamo kiel la plej bonan ŝancon por sia lernado kaj ekzercado. Ili modeste akceptis la konsilon de la trejnisto. Du minutojn post la komenco de la dua maĉo ili gajnis unu poenton per intensa atako kaj poste du. Kvankam la niveloj de la du teamoj estis malsamaj, tamen ambaŭ atingis sian plej bonan nivelon. Post la konkurso ili denove kunsidis por serioze resumi kaj interŝanĝi spertojn lige kun la praktiko de la konkurso.


La novaj moroj de unuiĝo, amikeco, interlerno kaj interhelpo en altigo de tekniko, same kiel montritaj de la ŝanhaja kaj tibeta teamoj, multe vidiĝis ankaŭ en la 6 konkursaj urboj. Multaj fortaj teamoj ne tenis inter si sekreton en tekniko kaj fervore helpis malfortajn. Kiam juĝisto hazarde faris eraron dum konkurso, la favorata flanko iniciate postulis korekton. Dum konkurso de korbopilko kaj piedpilko


circulis tia slogano “prefere perdi unu poenton ol vundi rivalan sportiston”. Por helpi falinton de la rivala teamo sportistoj prefere lasis favoran ŝancon por enĵeti pilkon.

La spirito de “amikeco la unua, konkurso la dua” montriĝis ĉie en la turniro, kaj precipe en decida momento ĝi ludis gravan rolon por garantii unuiĝon kaj glatan iradon de konkurso.

Foje, kiam la Fugian-a Virina Volana Teamo konkursis kun la junnan-a teamo, ili gajnis po unu poenton en la unuaj du maĉoj. En la decida tria maĉo de duopa konkurso, membro de la fugian-a teamo subite konvulsiis je kruro. Laŭ la konkursa regularo, en tiu kazo la sportistino povas ripozi kvin minutojn, se post kvin minutoj ŝi ankoraŭ ne povas konkursi, tio signifas rezignon de la konkursa rajto. Tiam, la situacio tre favoris al la junnan-a teamo, tamen ĝi konsideris ne sian sukceson, sed unuiĝon, lernadon de la forta kaj sperta fugian-a teamo kaj reciprokan altigon de la teknika nivelo en ludo de volano. Ili tuj proponis longigi la ripozan tempon kaj konkursi post kiam la rivalo resaniĝos. Post kuracado de pli ol 20 minutoj, la suferantino resaniĝis kaj la


*En la finalo de la virina tablotenisa unuopo*





*Dum konkursado en Pekino la hanaj kaj ujuraj sportistoj de Hingiang legas kuraĝigan leteron de laboristoj de la Traktora Fabriko "Okto-bro" de Urumĉi.*

*La ŝanhaja tablotenisisto Vang Gialin fervore lernigas ludarton al geknabaj tablotenisistoj de Tibeto.*





konkurso rekomenciĝis. La sportistinoj de ambaŭ flankoj ĉiamaniere faris plej grandan klopodon. Post kiam aperis 14:14 sur la poenta registrilo, la junnan-a teamo perdis la maĉon pro manko de sperto, tamen ĝia bona sportista moralo montrita en la decida momento profunde impresis la rigardantojn. La fugian-a volana teamo gajnis la ĉampionecon de virina teama konkurso post pluraj intensaj maĉoj. Kiam ĝiaj teamanoj akceptis la premion, ili alte taksis la profundan amikecon de fratinoj de la junnan-a teamo.

## NOVA NIVELO

En la turniro ĉie regis atmosfero de unuiĝo kaj amikeco. La sportistoj ne konsideris ĉampionecon, sed klopodis lerni de la rivaloj kaj altigi sian nivelon de tekniko. En favora situacio ili ne sidis sur la akirita sukceso kaj en malfavora stato ili ne deprimiĝis pro provizora malsukceso, sed batalis obstine. Ili batalis brave, obstine kaj aktive, kaj brila kaj animskua sceno en konkursejoj aperis senĉese.

La Gilin-a Virina Korbopilka Teamo, kiu gajnis la trian ĉampionecon de tiu konkurso, renkontiĝis en la komenco de la konkurso kun la ŝanhaja teamo, kiu atingis bonan sukceson en antaŭnelonga internacia konkurso. Sed, ĉar ĝi sin liberigis de spirita kateno de ĉampionismo, ĝi batalis brave en la tuta maĉo. Post la maĉo de 40 minutoj la poentoj de ambaŭ teamoj estis egalaj. En la decida longigita maĉo de kvin minutoj, unu veterana sportistino kaj kvar novuloj de la gilin-a teamo akiris la venkon. Ju ili pli konkursis, des ili pli altigis sian teknikon. En maĉo de la dua stadio de konkurso ili renkontiĝis kun la liaŭning-a teamo. En la alta temperaturo de 37-38°C, la sukcesa procento de iliaj ĵetpafoj atingis 69% kaj tiu de la punĵetado 100%. Ilia obstineco, batala spirito kaj teknika progreso ĝuis ĝeneralan laŭdon de la rigardantoj.

En 76 el 345 maĉoj en la stadio de korbopilka ronda konkurso la poentoj de ambaŭ flankoj diferencis je malpli ol 4. Kun egala teknika nivelo ilia supereco ne estis stabila. Iuj teamoj estis superitaj de la rivaloj en la unua stadio de konkurso, sed ili superis la samajn rivalojn en la dua stadio. Kaj la fazo de supereco de unu teamo ofte kaŭzis ŝanĝiĝon de supereco de la aliaj teamoj. La ĉampioneco de la vira korbopilka konkurso estis decidita nur post finiĝo de la lasta maĉo. Dum la konkurso de la lastaj ok teamoj, post intensa batalo de pli ol dek tagoj la virinaj volebalaj



*La volebalaj teamoj de la Pekina Fizikkultura instituto kaj Ŝenhi-provinco faras prezentadon por laboristoj.*


teamoj de Tiangin, Giansu, Fugian kaj Siĉuan gajnis saman kvanton da maĉoj, tial oni devis decidi la superulan ordon laŭ la de ili gajnitaj ludobataloj. Neniu el la piedpilka teamoj konkurantaj por gajni la unuajn 6 lokojn gajnis aŭ perdis ĉiujn maĉojn. Antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, la hubej-a piedpilka teamo neniam iris en la vicaron de la unuaj 12 venkintoj en la tutlanda konkurso, tamen tiufoje ĝi superis multajn fortajn teamojn per bona sportista moralo kaj tekniko kaj akiris la ĉampionecon.

Ĉio ĉi tio vivece montris la altiĝon de teknika nivelo de pilkaj sportoj de nia lando. Ĉiuj teamoj



*Piedpilkaĵ sportistoj de la Pekina Fizikkultura instituto kaj la Pekina Tria Kotona Ŝpinteksejo interŝanĝas ludarton.*

*Volanistino de Hubej Ĉen Juniang en maĉo*






aktive klopodis por krei novan batalmanieron kaj pene disvolvi sian teknikan superaĵon. Iuj famiĝis pro braveco kaj obstineco en konkurso, aliaj estis laŭdataj pro siaj sagaco kaj lerta tekniko, triaj bone kunagis kaj plene disvolvis la kolektivian forton kaj kvaraj posedis kompletan teknikon kaj lertis en atako kaj defendo. La rapida, elasta kaj preciza stilo en malsamaj manieroj malfermis ĝojindan viglan situacion por pilkaj sportoj de nia lando.

### SANE KRESKAS NOVAJ FORTOJ

La geknaboj estas nova forto kaj espero de la patrolando. En tiu turniro la nombro de geknaboj superis trionon de la totala sumo de sportistoj, du trionoj de tablotenisistoj kaj duono de gevolanistoj kaj volebalistinoj estis geknaboj. Eĉ en korbopilka kaj piedpilka teamoj, troviĝis ankaŭ novaj trupoj kun meznombra aĝo de 17-18 jaroj. Dum sia unua partopreno en la tutlanda turniro tiuj junaj sportistoj montris bonan kvaliton de modeste-co, lernemo kaj kuraĝeco en la konkurso kaj manifestis certan talenton.

En la unua stadio de la konkurso de 64 grupoj de viraj kaj virinaj unuopaj tablotenisaj maĉoj, 23 junaj tablotenisistoj venkis veteranojn kaj gajnis la ĉampionecon de la grupo. Ven Cungeng, kiu gajnis la subĉampionecon de la virina unuopa konkurso, estas 20-jara novulo de Ĝegiang. En la virina teama konkurso ŝi estis je unu kontraŭ du venkita de la pekina veteranino Li Li. Post tio ŝi modeste lernis, resumis sperton el la malsukceso kaj firmiĝis sian memfidon por akiri venkon. En la virina unuopa konkurso ŝi denove renkontiĝis kun Li Li kaj venkis ŝin je tri kontraŭ nulo. Poste ŝi venkis faman sportistinon de Ĝegiang Feng Mengja kaj aliajn kaj gajnis rajton de finalo de virina unuopa konkurso. En la finalo ŝi renkontiĝis kun liaŭning-a sportistino Hu Julian. Hu estas ofensiva sportistino, kiu tenas la frapilon en manprema maniero kaj havas kompare riĉan sperton de internacia konkurso. Fronte al tiu veterano, Ven Cungeng aktive atakis dekomence disvolvante iniciatan kaj rapidan stilon de niaj tablotenisistoj, kaj donis grandan minacon al Hu Julian. Ili faris 5 intensajn ludobatalojn. En la unuaj kvar ludobataloj iliaj poentoj estis



*Ufenhualige, mongola sportistino de la Virina Korbopilka Teamo de la Interna Mongolio (kuranta kun pilko)*

tute egalaj kaj en la kvina iliaj poentoj atingis egalecon de 20. Post malfacila batalado Ven Cun-geng estis malvenkita de Hu.

En la Hingiang-a Virina Volebala Teamo estas Han Hiufeng, la unua volebala sportistino de salaa nacieco ĉe norda piedo de Tiansan-montaro. Ŝi partoprenis en la teamo antaŭ pli ol unu jaro kaj sin ekzercis diligente. Dum ekzercado de repuŝado, trejnisto postulis, ke ĉiu faru sinsekve 400 movojn, tamen ŝi faris 450-500 movojn. Trejnisto postulis, ke ĉiu faru sinsekve 500 movojn de pilko-transdonado kontraŭ muro, ŝi tamen ĉiufoje faris 550-600. Dank' al diligenta ekzercado en ĉiu baza tekniko ŝi rapide progresis. Tiufoje ŝi kaj ŝiaj koleginoj gajnis la 12-an lokon de la virina volebala konkurso.

La Hubej-a Piedpilka Teamo kun meznombra aĝo de 22 jaroj estas vigleplena kaj brava en la konkurso. Ili decidis modeste lerni de aliaj teamoj kaj kuraĝe rivali kun fortaj teamoj. En la unua maĉo de la ronda konkurso ili renkontiĝis kun relative forta tiangin-a teamo. Sub la malfavora

situacio de poentoj de nulo kontraŭ unu, ili plentforte batalis kaj la poentoj atingis egalecon. En la longigita maĉo de tridek minutoj la poentoj de la du flankoj estis ankaŭ egalaj. Fine ĝi estis malvenkita de tiangin-a teamo je unu poento post 15 punaj piedfrapoj. Pro tio la maĉo kreis rekordon de nombro de punaj piedfrapoj.

La rigardantoj kaj sportistoj per varma mankrakado laŭdis ĉiun ĝojindan progreson de geknabaj sportistoj. Iuj veteranaj sportistoj ne nur diligente sin ekzercis kaj senĉese kontribuis al la sporta afero de la patrolando, sed ankaŭ zorgis la kreskon de junaj sportistoj. Fama volanistino de Guangdong Liang Hiaŭmu partoprenis plurajn internaciajn konkursojn kiel ŝtata teamano. Ĉifoje, pro vundo je la kruro ŝi ne partoprenis la konkurson. Tamen ŝi atente rigardis ĉiun maĉon de geknabaj sportistoj kaj iniciate donis al ili konkretan helpon.

La grandioza turniro kun daŭro de pli ol 20 tagoj manifestis la belan perspektivon de pli vasta disvolvigo de amasaj sportaj aktivadoj en nia lando.

*Gesportistoj de Liaŭning- kaj Ŝanhi-provincoj rikoltas tritikon en popola komunumo.*





# Korbopilka Ludo en Montvilaĝo kaj Ĉevalkonkurso sur Stepo

## LA VIRINA KORBOPILKA TEAMO DE MJAŬ-A MONTVILAĜO

Vespere, la subira suno ruĝigis la ĉielon super Mjaŭ-montaro kaj la lazura Kingŝuj-rivero ŝanĝbrilis. Post la taga laboro, hejmen iris la mjaŭ-naciaj komunumanoj de Dongfengĝaj-brigado de Tajgiang-gubernio, Mjaŭ- kaj Dung-nacia Aŭtonoma Subprovinco de Sudorienta Gujĝoŭ-provinco. Post vespermanĝo, aro da mjaŭ-aj knabinoj, en sporta vesto kaj kun hartubero, venis al draŝejo en la mezo de la montvilaĝo, kunportante korbopilkon.

De la Granda Proletara Kultura Revolucio, kun senĉesa disvolviĝo de la produkto kaj iompost-ioma altiĝo de la vivnivelo de la komunumanoj, ankaŭ la kultura vivo de Dongfengĝaj-brigado pli kaj pli vigliĝis. Nemalmultaj mjaŭ-aj knabinoj

partoprenis en sportaj aktivadoj de diversaj pilkoj, naĝado, pafado, ŝnurtirado, gimnastiko kaj aliaj. Dank' al prizorgo kaj subteno de la brigada partia filio, fondiĝis la Virina Korbopilka Teamo de Dongfengĝaj-brigado, kiu estas la unua teamo el mjaŭ-aj knabinoj en Dongfeng-distrikto. Depost sia naskiĝo, tiu teamo ofte sin ekzercas antaŭ aŭ post laboro kaj faras konkursojn kun aliaj teamoj de najbaraj komunumoj, brigadoj kaj lernejoj dum festaj aŭ feriaj tagoj.

Iutage, sur la nigra tabulo ekster la korbopilka ludejo aperis jena informo: "La Unuigita Virina Teamo de Dongfeng-distrikto konkursos kun la Virina Korbopilka Teamo de Dongfengĝaj-brigado." Baldaŭ komenciĝos amikeca konkurso inter la mjaŭ-aj kaj han-aj knabinoj.

Tuj post kiam la ludo komenciĝis, iu meza-statura knabino unue trafe pafis pilkon en meza dis-



*Ŝnurtirado de mjaŭaj  
komunumaninoj*

tanco, tio ricevis varmajn mankrakadojn de spektantoj. Ŝi estas Ĝang Hianju, estro de la virina teamo de Dongfengĝaj-brigado. Tiu knabino estas 26-jara, la plej aĝa el la knabinoj de la teamo. Aliaj 11 mjaŭ-aj knabinoj de tiu teamo estas nur 16-18-jaraj kaj ilia meznombra aĝo estas malpli ol 18-jara. Ĝang Hianju estas ne nur lertulo en korbopilka ludo, sed ankaŭ sturmanto en agrikultura produkto. Inspirite de ŝia konduto, ĉiuj aliaj teamanoj aktive partoprenis en produkta laboro. Ŝi estas bona centrulo de tiu teamo. Tiu-tage, ŝi ludis tre lerte kaj gajnis pli multajn poentojn ol tiujn de la aliaj.

En la mjaŭ-a virina teamo sin trovas altastatura nova membro, ŝi estas nomata Ĝang Deĝen. Ŝi multfoje kaptis altan pilkon kaj preskaŭ perdontan pilkon kaj poste lerte transdonis ĝin al sia teamano. Ŝi ricevis laŭdojn de la spektantaro pro sia sagaco kaj braveco. La patrino de Ĝang Deĝen rigardis la konkurson kun ridanta koro apude sidante sur sia tabureto.

Kiam nokta vualo estis falanta kaj la konkurso baldaŭ finiĝonta, en la lasta minuto Ĝang Hianju

trafe jetis la lastan pilkon ekster la pilkopuna zono. La teamo de Dongfengĝaj-brigado gajnis la venkon per 21:13. Kiam finiĝis la konkurso, la spektantoj faris varmajn aplaŭdojn pro la nobla stilo de amikeco kaj unuiĝo kaj obstina batalvolo de ambaŭ teamoj.


## STEPA ĈEVALKONKURSO

En aerfreŝa kaj sunbrila tago de la dua tagdeko de junio, ĉie sonis tamtamoj kaj tamburoj, bruis ridoj kaj henis ĉevaloj. La paŝtistoj de la paŝta Ĝangbaj-regiono okazigis tradician ĉevalkonkurson.

La ĉevalkonkurso estas unu el la sportoj ŝatataj de la paŝtistoj de la regiono. Post la Liberiĝo ili ofte okazigas tiun aktivadon por revui siajn sukcesojn en la brutobreda produktado, vigligi la kulture vivon de diversnaciaj popoloj kaj sin plifortigi.

La konkurso komenciĝis. Sesdek heroaj rajdantoj sur fortaj ĉevaloj dividiĝis en grupojn kaj

*Ĉevalkonkurso de paŝtistoj de Ĝangbej-gubernio de Hebej-provinco*





venis al vasta kurejo por partopreni en milmetra kurado. Tuj post kiam eksonis signalo por starti, ses kurĉevaloj eksturmis antaŭen, levante polvonubojn. En palpebrumo ili jam galopis preter spektantoj starantaj apud la meza parto de la kurejo. La plej antaŭa rajdanto estas 26-jara Li Ĝonggen, juna paŝtisto de Ĝangbej-gubernia paŝtejo "La Sepa de Majo". Li estas tre fame konata rajdanto sur la stepo kaj gajnis la unuan lokon en la tuta gubernia ĉevalkonkurso de 1,250 metroj antaŭ 13 jaroj.

La ĉevalkonkurso sur la Ĝangbej-a Stepo estas tre populara. Inter la konkursanoj sin trovis maljunuloj kun blankaj barboj kaj ankaŭ knaboj kun ruĝaj kravatoj ĉirkaŭ la kolo. Kun la proksimiĝantaj hufumsonoj de ĉevaloj alrajdas tri samfamilianoj, kiuj estas Gong Luntang, vicprezidanto de la revolucia komitato de Mangguo-brigado de Liangmiang-komunumo, lia frato Gong Ĉangtang kaj lia filo Gong Hikian. Kvar vigleplenaj milicaninoj ĵus fulmorapide preterkuris, sekvante ilin alkuris tri knaboj-rajdantoj kun svingiĝanta vipo. 13-jara knabo Li An gajnis la unuan lokon en la knaba konkurso. La 50-jara mongola komunumano Namugila en nacia vesto kuris inter han-aj

kaj mongolaj rajdantoj. Li estas maljuna, sed fortika, plena je juneco kaj energio.

Je signala pafo, ŝultre portante pafilon kaj levante sabron, milicanoj komencis prezenti pafadon kaj hakadon sur galopanta ĉevalo. Inter ili sin trovis 43-jara An Fej, kiu iam estis kavaleriano de ĈPLA dum la periodo de la Liberiga Milito. Post malmobiliziĝo li diligente sin ekzercis en militarto kaj estas ĉiam preta defendi la patrolandon.

La animskua surĉevala prezentado estas tradicia programero en la ĉevalkonkurso de nia lando, kio postulas tre altan rajdlertecon. Sur la fulmorapide kurantaj ĉevaloj la rajdantoj multe faris animskuajn manovrojn: Iuj sin apogas sur ambaŭ manoj al selo kaj levas sian tutan korpon en la aero horizontale kun kapo antaŭe kaj piedoj poste aŭ transverse; aliaj jen ruliĝas flanken de la ĉevalo jen denove surĉevaliĝis; triaj staras sur unu piedingo ĉe unu flanko de ĉevalo kaj sin turnas por fari pafadon al malantaŭa direkto; ankoraŭ kelkaj surdorse portas homon kvazaŭ por savi vunditon. La brilaj prezentoj gajnis varmajn laŭdojn de la spektantoj.



### AROMPIRO DE KORLA

Bajinguole-a Mongola Aŭtonoma Subregiono de Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono estas ĉefa produkto de la fama korla arompiro. En la kuranta jaro la plantareo de tiu pirarbo pliiĝis je pli ol 2,000 muoj. Nun la fruktaj ĝardenoj en la tuta subregiono okupas pli ol 29,000 muojn.

Korla arompiro estas unu el la famaj fruktoj de Hingiang. Ĝi famiĝis pro sia ĉefa produkto Korla. Ĝia alia produkto estas Luntaj-gubernio. Tiu piro abundas je suko, havas brilan koloron kaj aroman guston kaj plaĉas al diversnaciaj popoloj.

### RIĈA RIKOLTO DE DONGTING-ERIOBOTRIO

Riĉa rikolto de Dongting-eribotrio, fama frukto de Giangsu-provinco, estis akirita. Ĝia totala produktokvanto plimultiĝis je 50% ol tiu de la pasinta jaro kaj ankaŭ ĝia kvalito altiĝis multe.

Dongting-eribotrio estas produktata en la orienta kaj okcidenta Dongting-montoj en Tajhu-lago, Vuhian-gubernio. Ĝi famiĝis pro siaj brila koloro, maldika ŝelo, dika karno, malgranda kerno kaj multa suko. Por disvolvi la produktadon, kvar komunumoj de la produkto donis grandan atenton al mastrumado de eribotriuj. Ili ĝenerale sterkis la arbojn je la lasta vintro por konservi varmon kaj printempe sterkis por akceli fruktiĝon. Ili serioze disvastigis novan teknikon pri inokulado, branĉordigado kaj sterkado, tiel ke la eribotriaj branĉoj kun folioj prosperis kaj abundis je fruktoj.

# Tabloteniso en Landlima Monturbo

**H**UNGIANG estas nova landlima monturbo de Gilin-provinco en la Nordoriento de Ĉinio.

En serena tago ni vizitis la urbon. Hungiang estas ĉirkaŭata de montoj, ĝiaj loĝkvartaloj dislokiĝas sur la deklivoj kaj unu kvieta rivero fluas tra la urbo. Ĝuste en tiu malgranda monturbo 4 tablotenisistoj estas senditaj al la Pekina Fizikkultura Instituto kaj 12 al la provinca fizikkultura lernejo.

## ALTEN FLUGAS AGLIDO


En Hungiang troviĝas libertempa fizikkultura lernejo, kie sin ekzercas kaj lertigas geknaboj-amatoroj de tabloteniso. Vang Ŝihuj estas unu el ili. En la Tutlanda Geknaba Tablotenisa Turniro okazigita

en Ŝenjang en aprilo de 1972, ŝi estas vicigita kiel la unua semo de la tablotenisistinoj.

Kiam ni vizitis ŝin, kun iom hontema mieno ŝi rakontis al ni tre interesajn okazintaĵojn pri si mem.

Vang Ŝihuj ekamis tablotenison de tiam, kiam ŝi rigardis tablotenisan ludadon de Ĝuang Zedong kaj Kiu Ĝonghuj en filmo pri la 26-a Monda Tablotenisa Ĉampioneca Turniro, kiun prezentis filmprojekcia taĉmento en Hekoŭ-popolkomunumo kie loĝas la familio de Vang Ŝihuj. Ŝi estis tiel sorĉita de la filmo, ke sur la hejmevena vojo ŝi ankoraŭ imitis la movojn de ludado. Vespere de la sekvanta tago la knabino, kiu neniam iris malproksimen for de la hejmo kaj lernejo, subite forestis. Ŝiaj instruistoj kaj gepatroj ŝin serĉis ĉie kaj trovis ŝin sur ŝoseo post

*Tablotenisaj amatoroj en la libertempa fizikkultura lernejo*





la deka horo nokte. La afero tiel okazis, ke ŝi refoje iris rigardi la filmon, sekvante la filmoprotekcion taĉmenton. Ekde tiam la blanka pilketo fariĝis kunulo de Vang Ŝihuj kaj ŝi ĉiutage ĝin batadis al nigra tabulo aŭ al muro per frapilo. Poste la urba libertempa fizikkultura lernejo akceptis tiun 9-jaran knabinon en sian tablotenisaran grupon. Ĉiutage post lernohoroj ŝi iris al tiu lernejo por sin lertigi en tablotenisa ludado malgraŭ vento kaj pluvo. Vespere de iu dimanĉo subite fulmo tondris kaj pluvegis. Trejnisto diris al la aliaj lernantoj, ke Vang Ŝihuj certe ne venos, ĉar ŝia hejmo estas fora je pli ol kvin kilometroj. Apenaŭ li finparolis, la knabineto nudpieda kaj malsekigita enpaŝis en la ĉambron de tabloteniso kun pluvombrelo en unu mano kaj ŝuoj en la alia. Ŝia obstineco kaj persistemo en ekzercado kortuŝis ĉiujn ĉeestantajn kamaradojn.

Dank' al diligenta ekzercado Vang Ŝihuj rapide progresis. Vintron en 1964 malpli-ol-10-jara Vang Ŝihuj la unuan fojon partoprenis la Geknaban Tablotenisan Turniron de Gilin-provinco. Ŝi kaj ŝiaj kamaradetoj gajnis la ĉampionecon de la virina teamo de la tuta provinco. Kaj en la postaj du tutlandaj geknabaj turniroj ŝi ankaŭ atingis relative bonan sukceson. Dum fermiĝo de la Tutlanda Geknaba Tablotenisa Turniro en 1966 Ĉefministro Ĝou Enlaj akceptis sportistojn el diversaj lokoj de la tuta lando. Kiam Ĉefministro Ĝou donis premion al ŝi, li firme premis ŝian manon kaj intime kuraĝigis ŝin: Vin ekzercu diligente por gajni honoron por la patrolando. De tiam ŝi sin ekzercas ankoraŭ pli energie. Post nelonge ŝi estis sendita al la Pekina Fizikkultura Instituto. En Pekino ŝi faris amikan konkurson kun sportistinoj de Japanio, Kolombio kaj aliaj landoj, kaj ŝia tablotenisa ludado ricevis laŭdon de fremdlandaj amikoj.

### TRI GEFRATOJ DE FAMILIO DING

Matenon de iu dimanĉo ni promenis en nova laborista loĝkvartalo de Hungiang kaj vidis, ke multaj homoj amasiĝis sur placo antaŭ domo kaj de tempo al tempo

aŭdiĝis manklakado kaj hurao. Ni alpaŝis kaj trovis, ke tie iras streĉa tablotenisa konkurso. La akompananta kamarado diris al ni, ke tio estas konkurso inter gefratoj. La ludanta knabo nomiĝas Ding Hua kaj estas 14-jara, kaj la knabino Ding Fej 12-jara. Ili ambaŭ estas kaj bonaj lernantoj en la lernejo kaj lertaj tablotenisistoj en la libertempa fizikkultura lernejo. La juĝisto estas ilia patro, ŝoforo de la urba transporta kompanio. La pliaĝa frato Ding Hua kvazaŭ tigrido forte frapis la pilkon kaj malpliaĝa fratino Ding Fej malrapide resendis la pilkon. La poentoj estis preskaŭ egalaj, kaj aperis tiuj scenoj: 15 kontraŭ 15, 16 kontraŭ 16. La patrino estas flegistino de iu hospitalo, ankaŭ ŝi estas fervora rigardanto. Ŝi streĉe fiksas sian rigardon al la fluganta pilko. Kiam la filino tranĉis la pilkon eksteren de la tablo, ŝi ekstervole kriis bedaŭre. Kiam la frato iom post iom superis la fratinnon kaj fine venkis ŝin per 22 kontraŭ 20, la

*Gefratoj de Ding kaj iliaj kunlernantoj ludas en la korto.*



patrino tuj prenis la filinon al sia sino kaj konsolis: "Ne maltrankviliĝu, ĉerpu lecionon el la malsukceso kaj vin diligente ekzercu!"

Finiĝis la konkurso. Majstro Ding varme invitis nin en lian domon. En interparolo ni informiĝis, ke li havas ankoraŭ filon dekjaran, kiu estas ankaŭ tablotenisisto kaj nun partoprenas en konkurso de alia loko.

Kamarado Ding estas fervora amatoro de tablotenis. Li aĉetis por siaj gefiloj po frapilo kaj faris por ili simplan tablon en libera tempo. De tiam komenciĝis ekzercado en lia hejmo. Ding Hua fariĝis trejnisto, lia patro juĝisto, kaj liaj avino kaj patrino fervoraj spektatoroj.

Dank' al diligenta kulturado de la instruistoj de la libertempa fizikkultura lernejo kaj subteno de la gepatroj, rapide progresis Ding Hua. Li gajnis la trian ĉampionecon de la vira unuopo en la tablotenisista konkurso en Tonghua-regiono. Rapide progresis ankaŭ la malpliagaj gefratoj Ding Fej kaj Ding Gang. Ding Gang estas elektita kiel knaba tablotenisisto de Gilin-provinco kaj partoprenis la Tutlandan Geknaban Tablotenisan Turniron en 1972.

## DILIGENTA TREJNISTO

Tiel multaj eminentaj tablotenisistoj elkulturiĝis en tiu malgranda monturbo ĉe la piedo de Ĉangbajmontaro. Kiel ili sin ekzercis kaj lertigis?

Iun vesperon, ni venis al la libertempa fizikkultura lernejo. Ĝi estas vico da ruĝbrikaj domoj. En la vasta tablotenisista ĉambro instaligis multaj tabloj kaj pli ol 30 geknaboj sin streĉe ekzercis. Ni vidis, ke ĉe iu tablo staras mezastatura junulo, kiu estis instruanta al knabino pli alta iomete ol la tablo rapidan repuŝon de pilko. Vidinte, ke la knabineto ŝvitegis, li transdonis al ŝi lavtukon. Kun naiva rideto la knabineto forviŝis ŝviton sur sia vizaĝo kaj daŭrigis ekzercadon. La junulo estas neniu alia ol Hju Ĉuangi, kiu estas honore nomita kiel modela trejnisto de la tutlandaj libertempaj fizikkulturaj lernejoj.

Antaŭe kamarado Hju estis laboristo, kiu manipulis maŝinon por levi lignon kaj plurfoje estis honorita per nomo de avangarda laboranto. En libera tempo li ŝatis ludi tablotenison, multfoje partoprenis provincajn kaj urbajn konkursojn kaj atingis relative bonan sukceson. Post fondiĝo de la libertempa fizikkultura lernejo li fariĝis ĝia trejnisto.

Li estas ne nur trejnisto en sportejo, sed ankaŭ helpanto en lekciado kaj flegisto en vivo. Foje, ĉiuj

lernantoj alvenis escepte de Gaŭ Kujlian. Vespere li vizitis ŝian hejmon kune kun aliaj lernantoj. Gaŭ Kujlian malvarmumiĝis kaj kuŝis sur la terlito. La patrino de la knabino sentis neesprimeblan ĝojon vidinte, ke tiel multaj homoj zorgas ŝian filinon. Dum ŝia malsaniĝo trejnisto Hju ĉiuvespere iris al ŝia hejmo por doni al ŝi lecionojn. Post ŝia resaniĝo li helpis ŝin en ekzercado de bazaj movoj de repuŝado de pilko. Malgraŭ, ke la brako laciĝis pro sennombraj frapoj, Gaŭ Kujlian tamen ne volis ripozi. Dank' al la pacienca helpo de trejnisto Hju, ŝi rapide progresis. En la Tutprovinca Mezlerneja Tablotenisista Turniro en 1964 ŝi akiris ĉampionecon de la virina unuopo. Hju Ŝaŭfa persone elkulturita de Hju Ĉuangi estis elektita en la Pekinan Fizikkulturitan Instituton antaŭ kelkaj jaroj kaj faris amikan viziton al Japanio kiel membro de la Ĉina Tablotenisista Teamo. En la lastaj jaroj li, kiel membro de la Ĉina Tablotenisista Teamo, plurfoje faris amikajn konkursojn kun alvizitantaj tablotenisistoj de pli ol dek landoj kiaj Usono, Svedio, Japanio, Britio, Jugoslavio.

Post vizito al tiu trejnisto fervora por la patrolanda fizika afero, ni des pli respektis lin kaj profunde sentis, ke kresko de iu eminenta sportisto estas neapartigebla kun entuziasma kulturado de multaj trejnistoj.

## TABLOTENISADO DISFLORAS ĈIE EN LA URBO

Tablotenisado disfloras ĉie en la monturbo Hungiang. Ĉu en fabrikoj kun altaj fumtuboj aŭ en prospera arbaro, ĉie oni povas vidi tablotenisan ludon. Laŭ statistiko, en la tuta urbo estas 416 amatoraj tablotenisaj teamoj kaj pli ol 53,000 geknaboj ofte partoprenas en la sporto. 25 tablotenisistoj de la tuta urbo partoprenis la tutlandajn konkursojn. Duono de la membroj de la tablotenisista teamo de Gilin venis de Hungiang. Multaj lernantoj de la Hungiang-a libertempa fizikkultura lernejo fariĝis postlaboraj tablotenisaj trejnistoj en fabrikoj, vilaĝoj kaj arbohakejoj. Ili kulturis multajn aliajn tablotenisistojn.

Je la forlaso de Hungiang, ni legis en iu afiŝo: Morgaŭ okazos en Hungiang konkurso de amatoraj geknabaj tablotenisaj teamoj de Tonghua-regiono.

Ni profunde kredas, ke morgaŭ la monturbo certe fariĝos ankoraŭ pli ĝoja kaj pli vicleplena, morgaŭ tiuj geknabaj sportistoj sane kreskos kiel verdaj pinoj sur montoj.




# Pli-ol-2000-jara

## Antikva

# Tombo Ĵus Malkovrita

*Lakitaj objektoj*



**J**E la fino de aprilo de la kuranta jaro, oni malfermis antikvan tombon de pli ol 2,100 jaroj ĉe Mawangduj en la orienta antaŭurbo de Ĉangŝa de Hunan-provinco, Ĉinio. La kadavro, ĉerkoj, ĉerkujoj kaj aliaj objektoj entombigitaj bone konserviĝis. Tiu antikva tombo estas nomita de arkeologoj Han-dinastia tombo n-ro 1 ĉe Mawangduj. Oni trovis en ĝi grandan nombron da valoraj historiaj restaĵoj.


La nove malfermita antikva tombo situas ĉ. 4 kilometrojn fore de la centro de la urbo Ĉangŝa. Tie estis du teramasegoj, starantaj unu oriente tuj apud la alia okcidente. La nomita tombo troviĝas sub la orienta teramasego, kiu plejparte estis konstruita el kompaktigita tero, altis je 20 metroj kaj

sidis sur bazo de diametro de 50-60 metroj. La supro de la kompaktigita teramaso estis ronda kaj ebena, kun diametro de pli ol 20 metroj. Sub la kompakta teramaso estas la tombokavo. La kavo longas de la norda ĝis la suda fino je 20 metroj, larĝas je 17.9 metroj kaj profundas je 16 metroj. La kavo estis replenigita per flava, bruna kaj ruĝa grundoj kompakte kunpremitaj. Ĉirkaŭ la ekstera ligna ĉerkujo estis 30-40 centimetrojn dika tavolo da ligna karbo kun totala pezo de pli ol kvinmil kg. Kaj tiu tavolo estis enfermita per argilo.

La ekstera, meza kaj interna ĉerkujoj kaj la ekstera, meza kaj interna ĉerkoj unu en alia estas metitaj sur tri lignaj traboj ĉe la fundo de la kavo. La tabuloj de la ĉerkoj kaj ĉerkujoj estas kunigitaj per

lignaj tenonoj. Inter la ekstera kaj meza ĉerkujoj estas 4 liberaj lokoj similaj al 4 kestoj, en kiuj metiĝis diversaj objektoj akompane al la kadavro. Inter la aliaj ĉerkujoj kaj ĉerkoj preskaŭ ne estis spaco. La kvar flankoj kaj tegiloj de la ekstera kaj meza ĉerkoj estas lakitaj kaj kolore pentritaj. Sur la lakite nigra fono de la ekstera ĉerko estas ornamita per nubo-desegnoj en blanko, ruĝo, nigro, flavo kaj aliaj koloroj; inter la nuboj estas pentrita granda nombro da monstroj, kiuj luktas, ĉasas, ludas muzikilon, dancas aŭ postkuras birdojn, ferocajn bestojn, bovojn, cervojn ktp; la tegilo kaj la kvar flankoj de la ĉerko estas borderitaj per 14 centimetrojn larĝaj ornamaj desegnoj de geometriaj figuroj. La meza ĉerko en korala ruĝo havas sur si kolorajn desegnojn. Ĝia tegilo havas sur si koloran pentraĵon de du luktantaj tigroj kaj du luktantaj drakoj en nuboj; ĝiaj kvar flankoj estas borderitaj per 11 centimetrojn larĝaj ornamaj desegnoj de geometriaj figuroj, inter kiuj pentriĝis montoj, nuboj, drakoj, kurantaj cervoj, monstroj ktp. La kvar flankoj kaj tegilo de la interna ĉerko estis tapetitaj per brodita silkaĵo kaj silkaĵo ornamita per algluitaj plumoj. La brodita silkaĵo surhavas florbranĉajn desegnojn en bruna koloro; la plumoj gluitaj sur la silkaĵo estas flavaj,

*La elterigitaj ĉerkoj, ĉerkujoj kaj diversaj objektoj akompane al la kadavro*





La meza ĉerko pentrita per lako




Lakita vazo




Fajenca incensujo






Brodita silkaĵo kun teksita desegno de pokaloj


Silka flago kun kolora pentraĵo










Silka robo, broditaj mufgantoj kaj silkaj ŝuoj




Trikolora silka brodaĵo

Brodita silkaĵo






Muzikaj tuboj de 12 tonoj kaj brodita sako




Granda ventumilo



Blovinstrumento *ju*

Ligna muzikilo kun 25 kordoj





nigraj kaj verdaj en formo de romboj. Tia bele ornamita ĉerko estas unuafoje trovita en nia historio.

En la interna ĉerko kuŝis virina kadavro kun la vizaĝo supren, la kapo en la nordo kaj la piedoj en la sudo. Ĝi estas tre bone konservita kaj longas je 154.5 centimetroj. Medicinaj laborantoj de la Medicina Instituto de Hunan konstatis post esplorado pri ĝi, ke ĝia subhaŭta histo ankoraŭ estas elasta kun fibroj klare distingeblaj kaj la koloro de ĝia femura arterio similas al tiu de freŝa kadavro, kaj kiam oni injektis al ĝi antisepsaĵon, ĝia mola histo ŝveliĝis kaj iom post iom lasis la injektaĵon disiĝi. En la supra parto kaj ĉe la hilo de la maldestra pulmo troviĝas po unu calcizita punkto kun grandeco de sojfabo. La virino kredeble mortis en aĝo de ĉ. 50 jaroj. La kadavro estas volvita en 20 tavoloj de diversaj vestoj kaj ligita de la kapo ĝis la piedoj per 9 silkaj zonoj. Kaj tiu volvaĵo estis kovrita per vatita flava silka robo pentrita per arĝenta farbo kaj brodita silka vatita robo.


Laŭ la surskribaĵoj de la elterigitaj objektoj kaj objektoj metitaj en la ĉerkujo, oni konstatis, ke la kadavro estas familiano de unu el la tri generacioj

de *dajhoŭ*-nobelo nome Lilun, Hi kaj Pengzu en la rega periodo de la imperiestroj Hiaŭhujdi kaj Gingdi (193-141 a.k.) de Okcidenta Han-dinastio.

En la antikva tombo oni trovis pli ol mil objektojn, inkluzive de silkaĵoj, lakitaj objektoj, bambuaj kaj lignaj objektoj, fajencaĵoj kaj manĝaĵoj. Inter la pli ol 120 silkaĵoj, troviĝas kompletaj vestoj kaj silkaj ŝtofoj. Diversaj estas iliaj delikateco kaj teksmaniero kaj iliaj koloroj varias je bruno, purpura ruĝo, grizo, cinabro, flava bruno, hela flavo, bluo, verdo kaj blanko. La desegnoj sur ili estis teksitaj, broditaj aŭ pentritaj, en formoj de animaloj, belaj nuboj, rampaj tigoj kaj geometriaj figuroj de rombo ktp. Iuj silkaĵoj estas tre delikataj. Ekzemple, iu silka robo kun longeco de 128 centimetroj kaj manikoj 190 centimetrojn longaj pezas nur je 49 gramoj, kaj peco da silka ŝtofo kun larĝeco de 49 centimetroj kaj longeco de 45 centimetroj pezas nur je 2.8 gramoj.

La plej valora el la elterigitaj objektoj estas la kolore pentrita silka flago, kiu kovris la internan ĉerkon. La tuta pentraĵo longas je 205 centimetroj kaj larĝas je 92 centimetroj je la supra parto kaj 47.7 centimetroj je la malsupra parto kaj ornamaj ruban-

### *La elterigita virina kadavro*





*Malmola fajenca vazo kaj ĝia argila sigelo*

doj estas alkudritaj al ĝiaj kvar anguloj. La bildo estas pentrita per glataj kaj delikataj linioj kaj samnuancaj koloroj. Por la pentraĵo oni aplikis cinabron kaj aliajn blujn kaj verdajn mineralajn farbojn en forta kontrasto, tiel ke ĝi aspektas tre bela. La homaj figuroj kaj la animaloj en la bildo estas tre vivecaj. La riĉa enhavo de la bildo prezentas scenojn de la tero, homa vivo kaj la ĉielo, surbaze de legendo kaj tiutempa socia vivo, parte fantazie, parte realisme. Tiu pentraĵo, kiu tiel harmonie kunmetis diversajn enhavojn en unu verkon, estas malofta majstraĵo inter niaj antikvaj silkaj pentraĵoj.

Inter la pli ol 180 elterigitaj lakitaj objektoj de pli ol dek specoj estas pokaloj, teleroj, tripedaj kaldronoj, vazoj, skatoloj kaj pelvoj. Inter ili la plej rafine formitaj estas la skatoloj por enteni pokalojn kaj rondaj tualetujoj. La lakitaj objektoj estas plejparte lignaĵoj dike surkovritaj interne

per ruĝa lako kaj ekstere per nigra lako kaj ĉiuj aspektas brile. Sur la lakitaj objektoj troviĝas diversaj desegnoj kaj vortoj skribitaj per cinabro, ruĝa lako aŭ nigra lako, kiuj indikas, al kiu la objekto apartenas, por kio ĝi uziĝas aŭ kia estas ĝia kapacito. En parto de la elterigitaj lakitaj objektoj ankoraŭ restis pecetoj de lotusa radiko, kokaj ostoj, fiŝoj kaj aliaj manĝaĵoj el rizo kaj tritiko.

El la 162 lignaj homfiguroj iuj estas grandaj kaj aliaj malgrandaj. La grandaj estas en stara aŭ sida pozo, iuj vestitaj kaj aliaj pentritaj en koloroj. La malgrandaj estas faritaj el branĉoj, ĉiuj kun vizaĝo nigre pentrita kaj nur tri el ili surhavas silkan aŭ linan veston. Estas rimarkinde, ke troviĝas grupo de 18 vestitaj kaj 8 pentritaj homfiguroj, el kiuj 3 starantaj homfiguroj estas kredeble servantoj kaj la aliaj 23 kun diversaj muzikiloj formas ensemblon. En la kontraŭa flanko de tiu trupo,



metiĝis lakitaj tabletoj, ekrano, bastonoj, broditaj kapkusenoj, saketoj por aromaĵo kaj lakitaj longaj tabloj plene ŝarĝitaj per manĝaĵoj. Tiu aranĝo kredeble montras al ni kiel la enterigita mastrino festenis kaj sin amuzis dum sia vivo.

Inter la elterigitaj objektoj sin trovas ankaŭ tri valoregaj muzikiloj. Unu el ili estas ligna muzikilo *se* en silka sako, 116 centimetrojn longa, nigre lakita je ambaŭ finoj, kun 25 kordoj kaj 4 kordostreĉiloj, ĉiuj bone konservitaj. Alia estas bambua blovinstrumento *ju*, 80 centimetrojn longa, kun 22 tuboj en du vicoj. Oni trovis ĝin en brokaĵa sako sur la ligna muzikilo. Ankoraŭ alia estas kompleto da bambuaj muzikaj tuboj de 12 tonoj kun diversaj longecoj, ĉe kies malsupra parto nigra surskribaĵo indikas la nomon de la respektiva tono. Ĉiuj tiuj tuboj estis metitaj en brodita sako.


Inter la elterigitaj objektoj sin trovas 312 bambuaj pecoj, kiuj surhavas vortojn elegante skribitajn, en nigra ĉina inko, ankoraŭ legeblaj. Inter ili troviĝas ankaŭ 50 fajencaj objektoj en 12 specoj. Krom la supre menciitaj objektoj, estis ankaŭ bambuaj kestoj, herbaj matoj, kuracaj herboj, manĝaĵoj (viandoj, fazeoloj, fruktoj, legomoj, ovoj ktp.), grenaj semoj, argilaj moneroj, sigeliloj, bronzaĵoj speguloj k.a.


La malkovrita tombo kun tia grandeco, tiel bele ornamitaj ĉerkoj kaj abundaj entombigitaj objektoj akompane al la mortinto, spegulas la nivelon de la ekonomio kaj kulturo de Okcidenta Han-dinastio. La granda kvanto da elterigitaj objektoj kun tiel multaj specoj, kiaj la altvaloraj silkaĵoj kaj fajnaj lakitaj objektoj montris, ke tiu ĉi malkovro estas senprecedenca, grava en la arkeologia laboro de nia lando. La kolora pentraĵo sur la silka flago kovranta la internan ĉerkon kaj la tri bone konservitaj muzikiloj estas maloftaĵoj en nia lando. La entombigitaj objektoj estas tre valoraj materialoj por studi la teksadon, lakadon, kostumojn de Han-dinastio kaj la antikvajn pentroarton kaj muzikon de Ĉinio.

La elterigitaj historiaj restaĵoj estas zorge faritaj de laborantaj popolanoj de la komenca periodo de Han-dinastio, ili estas kristalo de la saĝo kaj talentoj de laboruloj. En la feŭda socio, la saĝo kaj talentoj de la laborantaj popolanoj estis katenitaj kaj subpremataj kaj la diversaj objektoj kreitaj de ili per sango kaj ŝvito estis perforte alproprigitaj de feŭdaj nobeloj. *Dajhoŭ* de la komenca periodo de Han-dinastio estis nur malgranda nobelo kun

feŭdo de 700 familioj. La nobelo *dajhoŭ* konsumis tiel multe da homfortoj kaj valorajoj eĉ pro morto de sia familiano, por ne paroli pri la luksa vivo de lia familio. Tio plene malkaŝis la diboĉan vivon de la feŭda reganta klaso kaj ĝian kruelan ekspluatadon al la laboranta popolo. La malkovro de la Han-dinastia tombo liveris al ni abundajn atestaĵojn por nia konado pri la fundamentaj karakterizaĵoj de la feŭda socio kaj edukado pri la klasbatala historio.

*Bambuaj pecoj kun surskribaĵoj (parto)*





*Lignaj homfiguroj en ludado de muzikiloj*



## KURANTAJ AFEROJ

### KAMPARANO-LIGNOGRAVURISTO ŜI HANDING

En la lastaj jaroj, kamparano-lignogravuristo Ŝi Handing de Giangsu-provinco kreis novajn lignogravuraĵojn, kiuj spegulas nian socialisman revolucion kaj konstruadon.

En la Ekspozicio de la Tutlandaj Belartaj Verkoj en Pekino, estas elmontrita lia

nova verko *Batalo kontraŭ Ventego kaj Ondego*, kreita en la granda kultura revolucio. La verko modlis tri heroajn fiŝistojn en boato batalantajn kontraŭ ventego kaj ondego por kapti pli da fiŝoj. Tiu verko gajnis varman aplaŭdon de laboristoj, kamparanoj, soldatoj kaj kadroj.

La 43-jara Ŝi Handing estas membro de Ginhaj-komunumo de Kidong-gubernio, Giangsu-provinco. Li kreis pli ol cent lignogravuraĵojn ekde la jaro 1955. Du el ili estis ekspoziciitaj en pli ol 20 landoj, pli ol 30 aperis en tutlandaj ekspozicioj de pentraĵoj kaj pli ol 50 estis presitaj sur diversaj ĵurnaloj kaj gazetoj de nia lando.



# Sujongĝabu — Bona Kondukanto en Stepa Konstruado

**S**UR la granda stepo Ulanĉabu ĉe la norda piedo de Jinŝan-montaro de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio estas Bajanŝil-brigado de Bajjinĉaŭketu-popolkomunumo. Kiam ni atingis la lokon, antaŭ niaj okuloj aperis vicleplena prospera sceno: vasta paŝtejo abunda je akvo kaj herboj, nove starigitaj vilaĝoj dislokitaj sur la stepo, fervoraj laborantoj kaj gregoj de grasaj brutoj. Paŝtistoj prezentis al ni la sekretarion de la partia filio Sujongĝabu. Ili nomis lin “bona kondukanto en stepa konstruado”. En la lastaj pli ol dek jaroj, sub lia gvido mongolaj, han-aj kaj huj-aj popolamasoj grandpaŝe antaŭenmarŝis sur la vojo de konstruado de la nova socialisma stepo, en la direkto montrita de Prezidanto Maŭ.

## LA SOCIALISMA VOJO — NIA DEFINITIVA VOJO

Sujongĝabu naskiĝis en familio de malriĉa mongola paŝtisto de Hongĝaŭ-vilaĝo. Princoj, brutoposedantoj kaj superregantaj religiuloj forrabis la vivon de liaj gepatroj per kruela ekspluato. Je sia okjara aĝo Sujongĝabu jam devis preni vipon por paŝtadi por brutoposedanto. La Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ savis lin el la maro de mize-ro. La travivaĵo en la malnova kaj nova socio komprenigis al li la veron, ke Prezidanto Maŭ estas la granda savanto de la stepa popolo, kaj oni certe venkos se oni sekvados lin. En 1949, kiam lia hejmloko estis liberigita, la 18-jara Sujongĝabu postulis, ke oni varbu lin kiel bazan milicanon, kaj de tiam li aktive partoprenis en defendo kaj konstruado de la hejmloko. Post nelonge li aliĝis al la Komunisma Junulara Ligo kaj fariĝis milica taĉmentestro.

Printempe de 1956, respondante al la alvoko de la Partio Sujongĝabu venis de sia hejmloko al Ba-

janŝil por subteni tiean konstruadon. Post sia alveno, li fondis la unuan interhelpan grupon sur tiu stepo kune kun kelkaj malriĉpaŝtistaj familioj, laŭ la postulo de la supera partia organizo kaj la alvoko de Prezidanto Maŭ “**Organiziĝu**”.

Tuj post sia naskiĝo la interhelpa grupo renkontis multajn malfacilojn: estis nesufiĉaj laborfortoj, malmultaj brutoj, kompatinde malgranda kapitalo kaj baroj faritaj de reakciaj brutoposedantoj. Kion fari? Ĉu oni persistas en la socialisma direkto de interhelpo kaj kooperado aŭ forlasas ĝin timigite de la malfaciloj kaj malicaĵoj de la klasaj malamikoj? En la tagoj de intensa batalo inter la du klasoj kaj du vojoj, Sujongĝabu klarigis al malriĉpaŝtistoj la grandan instruon de Prezidanto Maŭ “**Nur la socialismo povas savi Ĉinion**” kaj montris al ili la brilan perspektivon de socialismo. Li diris: “Estas ne strange, ke la klasaj malamikoj oponas kontraŭ ni, kaj por iri la socialisman vojon oni ja devas batali kontraŭ ili ĝisfine. Sekvante Prezidanton Maŭ, ni liberigitaj paŝtistoj certe povas venki la malamikojn kaj malfacilojn kaj sukcese konstrui la novan stepon!” Liaj vortoj estis pravaj kaj firmigis la memfidon de la malriĉpaŝtistoj por bone funkciigi la interhelpan grupon.

Subtenate de la Partio kaj registaro, la malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj sub la gvido de Sujongĝabu solide batis la reakcian arogantecon de la klasaj malamikoj kaj mobilizis la grupanojn por fosi putojn, kio kreis kondiĉojn por disvolvi brutobredadon.

La interhelpa grupo funkciis ĉiam pli bone kaj grandiĝis rapide. Post nelonge ĝi transformiĝis en kooperativon sub la gvido de la partia komitato de la Flago. Sub la gvido de Sujongĝabu la paŝtistoj de Bajanŝil aliĝis al popola komunumo, en aŭgusto de 1958.

Hardite en multjaraj klasa batalo kaj produkta batalo, Sujongĝabu glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio en 1961 kaj estis elektita kiel sekretario de la partia filio de Bajanŝil-brigado. Liaj laboroj estis pli pezaj ol antaŭe. Kvankam li havas malaltan klerecon, tamen, en la lastaj pli ol dek jaroj, li diligente studis verkojn de Prezidanto Maŭ kaj ĉiam antaŭenmarŝas laŭ la socialisma vojo kun la amasoj sub sia gvido.

Foje, antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, du fremduloj alvenis kaj intencis aĉeti ĉevalojn je alta prezo. Iuj konsentis ilin vendi, sed Sujongĝabu decideme rifuzis tion. Prenante tion kiel ekzemplon, li organizis la komunumanojn al diskutado por klare distingi socialismon de kapitalismo. Li diris: "Niaj ĉevaloj estas posedaĵo de socialisma kolektivo. Se oni vendus ĉevalojn de la kolektivo al privatuloj por gajni pli multe da mono, tio stimulus la spontanee kapitalisman tendencon. Ni absolute ne devas tion fari! Kvankam la vendo estas bagatela, tamen tio koncernas la gravan demandon iri kian vojon!" Tiu diskuto donis al la amasoj profundan edukon.

La partia filio de Bajanŝil-brigado persistas en irado de la socialisma vojo, kaj la politika konscio de la komunumanoj senĉese altiĝas. En la lasta jaro, la brigado elektis pli ol 40 eminentajn komunumanojn, kiuj varme amas la kolektivon kaj tutanime servas al ĝi. Nemalmultaj junuloj estis elektitaj kiel kadroj de la brigado kaj produktaj grupoj kaj fariĝis kerna forto en la konstruado de la stepo.

Bajanŝil signifas riĉan montsupron en la mongola lingvo. Sed antaŭ la Liberiĝo ĝi estis loko senakva, malriĉa, ofte atakata de sekeco kaj kun kalvaj montetoj. Kiam Sujongĝabu estis nomita kiel la sekretario de la partia filio, la bestobredado de tiu loko restis en nomada stadio. Oni diris malespere: "Ni devas resti kie troviĝas akvo kaj herbo kaj foriri konsuminte ilin. Kiam la sekeca Bajanŝil-stepo troviĝos?"

Ĉu Bajanŝil povas ŝanĝiĝi?

"Malriĉeco igas aspiri al ŝanĝo, entreprenado kaj revolucio". Respondante al la alvoko de Prezidanto Maŭ "lerni de Daĝaj en agrikulturo", Sujongĝabu kaj aliaj komitatanoj de la partia filio sendis kadrojn al Daĝaj-brigado por lerno. Poste, ili sendis kadrojn al brutobredaj punktoj por propagandi Daĝaj-spiriton de batalo en malfaciloj kaj sinapogo sur la propraj fortoj, kaj samtempe gvidis la kadrojn kaj amasojn en analizo de la kaŭzo de malrapida disvolviĝo de la brutobreda produktado. Dank' al tio la kadroj kaj amasoj altigis sian konon kaj firmigis la memfidon. Ili decidis konstrui la stepon, kiel Daĝaj-brigado, sin apogante sur la propraj fortoj.

De kie oni devis komenci la konstruadon de la stepo? La partia filio invitis spertajn paŝtistojn al kunsido kaj faris kompletan analizon al la naturaj kondiĉoj: Bajanŝil situas en alta kaj malvarma zono je pli ol mil metroj super la mara nivelo, kie la

### *Sujongĝabu en paŝtado*





jara pluvokvanto estas 100-200 mm., sed la forvaporiga kvanto estas granda. El la totala areo de pli ol 500 kvadrataj kilometroj, pli ol 200 kvadrataj kilometroj da paŝtejo ne povis esti utiligataj pro manko de akvo. La kvanto de herbo por brutoj estis akre malsufiĉa. Paŝtistoj diris: "Herbo ne povas kreski sen akvo, kaj brutoj ne povas esti bredataj pro manko de herbo." Aŭdinte la vortojn, Sujongĝabu vidis klare, kiel la afero staras. Kun maljunaj paŝtistoj li persone trairis la tutan stepon por serĉi akvofonton, spite de frosto kaj sablovento. Ili observis tersurfacon, ekzamenis grundon kaj esploris kreskon de herboj kaj fine trovis utiligeblajn fontojn. Surbaze de tiu fidinda enketo, ili faris projekton de la brigado por disvolvi akvoutiligan konstruadon kaj decidis entrepreni kompare grandan konstruadon ĉe Nantan-paŝtejo.

Nantan-paŝtejo estas malalta kaj ĉirkaŭata de montoj, kaj ĝia rivero fluas de norde suden. En la supra parto de la rivero fluas abunda akvo, sed ĉi tie la fluo penetras sub la sablan riverujon. Post interkonsiliĝo kun maljunaj paŝtistoj Sujongĝabu decidis komenci konstruadon tie por altigi la nivelon de la akvo de la subtera rivero kaj irigacii per ĝi la paŝtejojn.

Ili komencis la konstruadon en somera mezo, kiam la vetero estis brule varma kaj la laboro peniga. Sujongĝabu ĉiam tenis bonan laborstilon de kadro partopreni en kolektiva produkta laborado. Ĉiutage li fosis kanalon, vekte portis teron kaj dorse portis ŝtonojn kune kun la komunumanoj. Ŝvito malsekigis liajn vestojn kaj sur liaj ŝultroj aperis kaloj. Ili laboregis du monatojn kaj la konstruado estis tuj finota, sed tiam subite pluvegis. La monta torento disfalis la ĵus konstruitajn kanalojn.

Antaŭ la detruitaj konstruaĵoj, Sujongĝabu pensis pri la heroa ago de Daĝaj-brigado, kiu batalakiris riĉan rikolton kaj rekonstruis siajn detruitajn ŝtuparajn kampojn kaj domojn post katastrofo kaŭzita de montaj torentoj. Kamarado Ĉen Jongguj, la sekretario de la partia filio de Daĝaj-brigado prave diris: "Se nur estas homoj, ĉio povas esti restarigita!" Sujongĝabu pensis en si: ni havas tiel multajn paŝtistojn, ni certe sukcesos en la konstruado. Li kolektis la komunumanojn sur la konstruejo por lerni heroan agon de la daĝaj-anoj, kio multe stimulis la amasojn al batalo kontraŭ la naturo.

En pli ol 3 monatoj, ilia konstruaĵo estis trifoje detruita de monta akvego kaj ili ĝin trifoje rekonstruis. Fine estis pretigita la konstruaĵo longa je pli ol 2,200 metroj por irigacii milojn da muoj da paŝtejoj per la riverakvo.



*Sujongĝabu kune kun komunumanoj planas konstruadon de la stepo.*

La akvoutiliga konstruaĵo akiris rimarkindan efikon. Nun, Bajanŝil jam formis irigacian reton kun la akvokonduka konstruaĵo kiel la centro kaj pumpoputoj kaj simplaj putoj racie dislokitaj. La dezerta stepo fariĝis verdaj paŝtejoj abundaj je akvo, herbo kaj arboj kie la paŝtistoj kaj brutaroj estas en prospero. Proksimume 200 kvadrataj kilometroj da akvomanka stepo fariĝis paŝtejoj, oni starigis paŝtajn bazojn kaj efektiviĝis memprovizon de furaĝo. La brigado akiris riĉajn rikoltojn de brutara produktado en ses sinsekvaj jaroj kaj la nombro de ĝiaj brutoj kreskis ĉ. 10-oble kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. Ankaŭ ilia kontribuo al la ŝtato pligrandiĝas ĉiujare. Finiĝis la primitiva nomada vivo de paŝtistoj kaj efektiviĝis paŝtado en fiksa loĝado. Bajanŝil fariĝis riĉa montsupro.

### LIA KORO ĈIAM LIGIĜAS KUN TIU DE LA PAŜTISTOJ

La amasoj de Bajanŝil laŭdas Sujongĝabu, ke lia ĉevalo ligiĝas ĉe la kolektiva paŝtejo kaj lia koro ligiĝas kun tiu de la paŝtistoj. Jes ja, Sujongĝabu estas sekretario de la partia filio, en 1970 li estis elektita kiel membro de la konstanta komitato de la


partia komitato de Ulanĉabu-subregiono kaj membro de la partia komitato de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. Malgraŭ la multiĝo de liaj oficoj kaj plipeziĝo de liaj laboroj, li ĉiam tenas intiman ligiĝon kun la amasoj. Tial li bone scias kion la amasoj pensas kaj bezonas.

Lastan printempon, Bajanŝil suferis de neĝega katastrofo, kiu daŭris 60 tagojn. La paŝtejoj estis kovritaj de dika neĝtavolo. La kadroj de la brutobredaj punktoj kun la amasoj sub sia gvido forbalais la neĝon sur parto de la paŝtejoj, sed al la brutoj ankoraŭ mankis sufiĉa herbo. Por protekti la brutojn estis necese liveri al la brutoj pli da furaĝo. Ĉu oni povas ĝustatempe tion fari, kiam la neĝo profundas ĝis la genuoj, la paŝtistoj brule maltrankviliĝis. En tiu alarma momento, Sujongĝabu jam streĉe laboris en la furaĝa bazo de la brigado. Li organizis ĉiujn kadrojn por aranĝi la transportan laboron, kaj persone kondukis kamelon ŝarĝitan per furaĝo al la paŝtaj punktoj kune kun aliaj komunumanoj, malfacile vadante en neĝo. Vidinte la silueton de Sujongĝabu, paŝtistoj emocie diris: "Sujongĝabu alvenas! Jen vera 'liveranto de karbo dum ne-

ĝado'!" Sub lia edifo, ĉiuj kadroj kaj amasoj unuiĝis por venki la katastrofon, kaj en tiu jaro ili denove akiris riĉan rikolton de bruto.

Sujongĝabu zorgas pri la amasoj, vivas inter ili, kaj iliaj avangardaj pensoj kaj kondutoj lin edukas kaj kuraĝigas. La brutobreda punkto Hajevasu bezonis fosadon de putoj pro manko de akvo, sed tiam la brigado havis multajn laborojn, tial Sujongĝabu ne tuj aranĝis fosadon de putoj. Tute neaten-dite, ĉiuj familianoj de avino Bamaŭ en tri generacioj fosis puton en 9 tagoj, studinte la verkon de Prezidanto Maŭ *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo*. El tio Sujongĝabu ricevis inspiron kaj stimulon kaj pli profunde komprenis la instruon de Prezidanto Maŭ "**la amasoj estas veraĵ heroj**". Li emocie diris: "Multaj aferoj povas esti ignorataj de kadro, sed nenio estas nefarebla por amaso!" Li tuj sendis kadrojn al la puto por pririgardi kaj lerni de la "stepa malsaĝa avo" Bamaŭ, kio akcelis la disvolviĝon de amasa akvoutiliga konstruado.

Sujongĝabu ne haltis ĉe la atingita sukceso, li vigle gvidas la amasojn de Bajanŝil en diligenta laborado por akiri pli grandan riĉan rikolton.



*Medikamenta banujo  
por ŝafaro*





*Profesoro Caj Kijun ekzamenas polenon de terpomo.*

# Por Disvolviĝo

## de Nia

# Ĝardenistiko

CAJ KIJUN

**M**I estas ĝardenistikisto, aĝas nun 57 jarojn. Post kiam mi diplomiĝis el la elementa lernejo kaj mezlernejo en mia hejmloko Tajvano, mi lernis en Japanio sep jarojn. Antaŭ la Liberiĝo, mi donis agronomian lecionon en iu mezgrada lernejo de Hejlonggiang-provinco. Kaj post la Liberiĝo mi partoprenis en revolucia laboro. La Kompartio kaj la popola registaro faris min, ordinaran mezlernejan instruiston de la malnova socio, profesoro.

En la jaro 1941, mi diplomiĝis el la agronomia fakultato de la Tokia Imperia Universitato de Japanio. Post mia reveno al la patrolando, mi volis fari kontribuon en ĝardenistiko. Sed, en la putra malnova Ĉinio, la ĝardenistiko estis tute ignorata. Kvankam, dum la regado de la manĉuria pupo kaj Kuomintango, oni establis esploran institucion de ĝardenistiko, tamen ĝi celis forrabadon en nomo de esploro. Post veno al nia lando, la "ĝardenaj kulturistoj" nutrataj de imperiistoj ĉie tiranis la popolanojn kaj perforte okupis grandan areon da bonaj kampoj. Ili kulturis tiujn plantojn kiujn ili ŝatis manĝi kaj neniam konsideris bezonon de nia popolo. Tiuj fiuloj ankoraŭ ŝtelis bonajn legomspeciojn kaj sperton de nia lando pri ĝardena

kulturo, kio multe malhelpis nian ĝardenistikan disvolviĝon. Kvankam mi lernis ĝardenistikon multajn jarojn, tamen mi neniam trovis lokon por ĝia uzo.

Post la Liberiĝo, la popola registaro fondis agrikulturan eksperimentejon en Hejlonggiang-provinco, kaj mi estis asignita kiel ĝia respondeculo pri esplorado de la ĝardenistiko, tiel ke mia lernitaĵo ricevis aplikadon kaj disvolviĝon. Post nelonge, mi estis sendita al la politika lernejo de Gilin-provinco kaj tie lernis ok monatojn. Mi diligente studis verkojn de Marks, Lenin kaj Prezidanto Maŭ kaj plimulte komprenigis la revolucion veron. Kaj mi decidis diligente servi al la popolo kaj aktive kontribui al la ĝardenistiko de la socialisma patrolando. Poste, la Partio sendis min al Gilin-a Agrikultura Universitato kiel profesoro kaj estro de ĝia agronomia fakultato. Ankaŭ mi estas konstanta komitatano de la Politika Konsiliĝa Konferenco de Ĉangĉun. En la malnova socio, mi ĉie klopodis por vivteno post la diplomiĝo el la universitato kaj havis nenian liberecon kaj rajton en politiko; hodiaŭ, mi ne nur havas garantion pri vivo kaj laboro, sed ankaŭ partoprenas en diskutado pri ŝtataj aferoj. Jen, kiel profunda estas la ŝanĝiĝo! Estas neforgeseble

por mi tutan vivon, ke mi feliĉe vidis la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ dum la kunveno en Pekino, je la 22-a de aŭgusto 1960. Tiam mi tre ekscitiĝis. Dank' al Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio mi, malriĉa kaj senelireja intelektulo en la malnova socio, havas ĉion mian hodiaŭan!

Edukate de la Partio dum la pasintaj jaroj, mi multe progresis en la scienca esplorado kun iompost-ioma altiĝo de mia politika konscio. Por plene disvolvi mian specialan kapablon en ĝardenistiko, la universitata partia komitato sendis min viziti kolegiojn, sciencesplorajn instituciojn kaj popolkomunumojn de Liaŭning, Guangdong, Ĝegiang, Henan k.a. kaj krome mi partoprenis en la simpozio de genetika bredo fondita de la Centra Agrikultura Ministrejo, kio kreis favoran kondiĉon por mi en scienca esplorado. Kaj mi okupiĝas ĉefe pri scienca esplorado krom direktado en instruaj laboroj de la agronomia fakultato.

Tomato estas nutroriĉa. Tamen en Gilin-provinco situanta en submalvarma zono, ĝi maturiĝas malfrue en somero kun malalta produktokvanto, ne povante kontentigi la bezonon de la vastaj polamasoj. En la jaro 1958, mi komencis elkulturi novan specion de tomato. Dum la kulturado, mi renkontis multajn malfacilojn, ekzemple, frukto krevis antaŭ sia maturiĝo. Por solvi la problemon mi lernis la verkon *Pri Kontraŭdiro*, en kiu Prezidan-

to Maŭ montras: “Ĉe studo de kiu ajn procezo, se tiu estas komplika, enhavanta pli ol du kontraŭdirojn, ni devas per la tuta forto trovi la ĉefan kontraŭdiron. Kiam tiu ĉi ĉefa kontraŭdiro estas kaptita, ĉiuj problemoj povas esti facile solvitaj.” Post ripetaj esplorado kaj analizado, mi fine trovis ke la seka klimato kaj malabundeco de akvo estas la ĉefa kaŭzo de kreviĝo de tomato. Tiam mi faris racian akvumadon kaj efike solvis la problemon. Post pli ol 4 jaroj, la nova specio de tomato estis sukcese elkulturita. Tiuspeca tomato estas dolĉa, freŝkolora, granda, konservebla kaj karnoabunda kaj portas malmultajn grajnoj kaj maldikan ŝelon. Ĝi grandkvante aperas en la merkato de nia nordorienta Ĉinio ekde la julia mezo kaj ĉiu kilogramo de ĝi kostas 8 cendojn. Tiu specio de tomato nun jam estas vaste kulturata tra la tuta provinco kaj multe bonvenigata de la amasoj.

La avantaĝa socialisma sistemo kaj politikoj de la Kompartio malfermis vastan vojon por disvolviĝo de la ĝardenistiko, kaj la instalaĵoj kaj aliaj bonaj kondiĉoj de la Gilin-a Agrikultura Universitato donis al mi multajn favorojn en mia scienca esplorado. Dum la lastaj pli ol dudek jaroj, kombinante kun instruado, sciencesplorado kaj produktado, mi kune kun la instruistoj kaj studentoj verkis pli ol dudek disertaciojn kiaj *La Influo de Printempa Semtraktado al la Produktkvanto de Brasiko kaj*



*Caj Kijun kaj alia profesoro kune kun studentoj esploras novan teknikon de hibridigo de terpomo.*



*Rafano, La Influo de Miksaĵo de Fermentita Ĉevala Fekaĵo kaj Tero al la Kresko de Ĝermoj, La Influo de Nitrogeno, Fosforo kaj Kalio al la Kresko de Solanaj Ĝermoj*, kiuj estis respektive publikigitaj sur sciencaj gazetoj aŭ revuoj, kaj inter kiuj iuj estis redaktitaj en instruajn materialojn, kio riĉigis la instruan enhavon kaj disvolvis la ĝardenistikan studon de nia provinco.

Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ pri kombiniĝo de teorio kun praktiko, ni ofte iris al vilaĝoj ĉirkaŭ la universitato por fari eksperimentadon, lerni de legom-kampanoj kaj servi al la produktado. Foje, kiam ni lernis en iu komunumo en ĉirkaŭaĵo de Ĉangĉun, ni rimarkis ke komunu-

manoj provfabrikis vegetaĵan akcelilon — “920”. Tamen, ili havis nenian rimedon por mezuri ĝian efikon. Tiam, ni rapide fabrikis unu mezurilon de “920”. Dank’ al tio, “920” estis vaste uzata, ĝi plifruigis la maturiĝon de spinaco, celerio, brasiko kaj aliaj legomoj je 5-7 tagoj kaj plialtigis ilian produktokvanton je 20-30%, eĉ je 60%.

Lastatempe, la Scienca kaj Teknika Buroo de Gilin-provinco donis al nia universitato 11 temojn por esplorado. Kaj la universitata partia komitato donis al mi novan temon pri la senvirusigo de terpomo. Tio estas konfido donita de la gvidantaro al mi. Mi decidis plenumi tiun ĉi gloran taskon kune kun aliaj instruistoj kaj studentoj.

# Ŝpardepono de Liberigitaj Servutuloj de Tibeto

**E**N la tibeta filio de la Ĉina Popola Banko aldoniĝis dum la lastaj jaroj granda nombro da novaj ŝpardeponantoj el la vastaj amasoj de liberigitaj servutuloj de Tibeto.

En la malnova socio, la servutuloj kaj sklavoĵoj eĉ ne havis personan liberecon. Ili estis ŝargitaj de tre peza uzuro. Hodiaŭ ili fariĝis mastroj kaj sekve de la leviĝo de sia vivnivelo pli kaj pli multaj el ili havas superbezonan monon por deponi en ŝparkaso.

Kun la vigla disvolviĝo de industrio, agrikulturo kaj brutobredado, prosperas la urboj kaj vilaĝoj de Tibeto; la prezoj de varoj estas stabilaj; la enspezoj de la tibetanoj plimultiĝis senĉese kaj ankaŭ la deponita mono en la ŝparkasoj kreskas tagon post tago. En 1971, la loĝantoj de Ĉengguan-kvartalo de Lhasa havis meznombro 30 juanojn en ŝparkaso. En Anduo-gubernio en la stepo de norda Tibeto, la loĝantoj okupiĝas nur pri paŝtado. Persiste irante la socialisman vojon la vastaj amasoj de paŝtistoj akiris riĉan rikolton en sinsekvaj jaroj.

En 1971, ĉiu persono en la gubernio deponis meznombro 57 juanojn.

Laŭ la statistiko de 1971, la deponita sumo en urboj kaj vilaĝoj de la tuta aŭtonoma regiono kreskis je 11% kompare kun tiu de 1965 antaŭ la granda kultura revolucio, kaj estis pli-ol-6-oblo de tiu de 1958 antaŭ la demokratia reformo. La periodaj deponoj okupis 64% de la sumo.

En la damninda malnova socio kun feŭda servuta sistemo, la uzuroj similaj al vipuroj turmentadis la milionon da servutuloj kaj suĉadis ilian sangon. Laŭ enketo pri kvar grandaj bienoj de Langtang kaj aliaj en 1951, 608 el la 658 servutulaj familioj, t.e. 92% de la tuto estis ŝuldantoj. La tri grandaj temploj de Lhasa, nome Ĝepung, Serra kaj Ngadan, pruntedonis uzure 33,135 tunojn da greno nur en agrikulturaj lokoj.

Pruntepreninte grenon de uzuristo, multaj servutuloj devis repagi de jaro al jaro, de generacio al generacio. Ekzemple, la liberigita servutulo Cijengongbu de sa-vilaĝo en Moĝugongka-gubernio,

estis kromnomata Miltunulo en la malnova socio. Lia familio prunteprenis grenon de uzuristo, kiam lia praavino vivis. La ŝuldo, kiun ili ne povis repagi en unu jaro, kreskadis jaron post jaro je kunmetita interezo, kaj pro trompado de la mastrosinjoro ĝi grandiĝis nur en kelkaj jaroj ĝis la cifero de mil tunoj. De tiam la ŝuldo pezis generacio post generacio sur la familio en pli ol cent jaroj. Kvar generacioj de la familio de Cijengongbu penlaboradis, ili tamen ne povis likvidi la ŝuldon. Estis multaj tiaj tragikaĵoj en Tibeto.

Post la Liberiĝo, sub la zorgo de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, la ŝtato pruntedonis seninterenze 1,330,000 juanojn al malriĉaj kamparanoj kaj paŝtistoj por solvi la malfacilojn en ilia produktado kaj vivo. La granda demokratia reforma movado renversis la kruelegan feŭdan servutan sistemon kaj nuligis la miljaran senfinan ŝuldon, la miliono da servutuloj sin plene liberigis de la uzura ekspluatado de la malnova socio. Poste la popola registaro pruntedonis grandan sumon da mono seninterenze aŭ je malalta interezo, kio pliapaŝe akcelis la disvolviĝon de agrikultura produkto kaj brutobredado kaj firmigis la kolektivan ekonomion. Ekde 1960, kreditaj kooperativoj estis starigitaj kaj malriĉaj kamparanoj kaj paŝtistoj ekhavis siajn banketojn. Nun vaste disvolviĝis la servo de la Popola Banko en Tibeto kaj krome en ĝiaj vastaj kamparoj kaj paŝtejoj jam fondiĝis kredita kooperativo, multaj komunumoj havas laboranton de kredita servo kaj ĉe fabrikoj kaj minejoj funkcias ŝparkasoj. Ili ĉiuj servas al la vastaj amasoj de kamparanoj, paŝtistoj kaj laboristoj por helpi ilin solvi malfacilojn en produkto kaj vivo.

La rapida disvolviĝo de la ŝpardepona afero de Tibeto rezultis el la leviĝo de la politika konscio de la liberigitaj kamparanoj kaj paŝtistoj kiuj volonte deponas sian superbezonan monon al bankoj kaj ŝparkasoj por subteni la socialisman konstruadon kaj rapidan disvolviĝon de la nacia ekonomio. La totala produktokvanto de greno kaj la totala nombro de brutoj de Tibeto en 1970 preskaŭ 2-obliĝis kompare kun tiu en 1958, ankaŭ en 1971 ili havis rimarkindan kreskon. En Tibeto malriĉa kaj postĝinta antaŭ la Liberiĝo, hodiaŭ funkcias centoj da mezaj kaj malgrandaj fabrikoj kaj minejoj. Surbaze de disvolviĝo de industrio, agrikulturo kaj brutobredado, iom post iom leviĝis la vivnivelo de la tibetanoj.

Kun la nuna feliĉa vivo, la vastaj amasoj de liberigitaj servutuloj diris emocie: "Estas la bona gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Partio, dank' al kiu ni tibetanoj povas ĝui tian feliĉan vivon."

LU JONG:

# Nova Fizionomio

## Regiono

**E**N la regiono de Fuĉun-rivero, Ĝegiang-provinco de nia lando, produktiĝas rizo, teo, alozo k.a.

En la baseno de tiu rivero akvoj tiel abundas, ke en multaj vilaĝoj oni povas tuj ĉe la malantaŭa por-do preni akvon por kuro kaj lavado, ekveturi per boato sub la ŝtupetaro al kamparo, kaj akvo mem fluas en kampojn por ilin irigacii, se nur oni levas kluzpordojn de kanalo aŭ akvorezervujo. Tio aperis tamen nur post la Liberiĝo. Antaŭ la Liberiĝo, kvankam la rivero konservis riĉfonton de akvo same kiel nun, ĝi tamen donis nur katastrofojn anstataŭ bonojn al tieaj popolanoj. La suferoj kaŭzita de inundoj en la pasinteco nun ankoraŭ freŝe restas en la memoro de la maljunaj kamparanoj. Mejjong de Tonglu-gubernio apud Fuĉun-rivero estas ekzemplo pri ŝanĝiĝo de akvoj.

Mejjong troviĝas sur Giuli-sablobenko apud Fuĉun-rivero, kies limo longas ĉ. 6 kilometrojn. Antaŭe ĝin menciante, tieaj loĝantoj ofte diris kapskuante: "Senespera estas tiu ĉi loko!" En seka sezono, la loko fariĝis pli alta ol la akvonivelo de la rivero kaj oni devis lasi la akvon forflui senutile; aŭtune subite la ŝveliĝinta rivero sin ĵetis sur la sablobenkon. El la 2,000 muoj da kampoj de la brigado nur 30 muoj estis rizkampoj, kies meznombra pomua produktokvanto estis nur iom pli ol 150 kg. eĉ en jaro de abunda rikolto; krome la kamparanoj ankaŭ suferis de subpremado kaj ekspluatado de bienuloj kaj lokaj tiranoj. Tiam la onidiro cirkulis:

*Sur la rizkampoj de sabl-benka longa nur  
naŭ liojn,  
ja preskaŭ ĉiam oni povis falĉi eĉ nenion,  
tutjare la rizvazoj ja malplenas de la grajnoj,  
neniu volis edziniĝi kun la tieanoj.*

Sed nuntempe, dank' al la kolektiva ekonomia forto de la komunumo kaj sia diligenta laborado, la komunumanoj jam konstruis 1 akvorezervujon kaj



de la

## de Fuĉun-rivero

17 pump-staciojn, fosis 21 irigaciajn kanaletojn suraŭ sub-terajn, aĉetis 17 elektrajn pumpilojn kaj 19 aliajn pumpilojn, kaj instalis por irigacio elektroliniojn kun longeco de 24 km., tiel ke pli ol 93 % de la agroj de la brigado povas esti irigaciataj per maŝinoj. Mejjong jam fariĝis riĉa vilaĝo.

Tamen, Mejjong-brigado faris penan laboron en sia konstruado. Ni prenu la konstruadon de Mejjong-kluzo en 1969 kiel ekzemplon. Tiujare Fuĉun-rivero inundis 600 muojn da fruriza kampo de la brigado. Por preventi inundon, kadroj de la brigado decidis konstrui ĉe la ekstremo de la sablobenko du-pordan kluzon kun alteco kaj larĝeco respektive de 7 metroj kaj longeco de 13 metroj, kaj digon 400 metrojn longan, 4 metrojn altan kaj 5 metrojn larĝan. La du projektitaj konstruaĵoj bezonis 60,000 labortagojn kaj pli ol 40,000 juanojn. Tio estis malfacila por la brigado. Iuj proponis, ke la ŝtato donu monon kaj ni fortojn; sed la vastaj amasoj de la komunumanoj diris: "Ni lernu de Daĝaj-brigado kaj plenumu la taskon nin apogante sur propraj fortoj."

Komenciĝis la konstruo en frosta vintro. En la dua tago de ilia intensa metado de la kluzbazo, elĉerpiĝis la sablo kaj gruzo, kio tuj minacis la iron de la konstruado. Tiam komunisto kaj kadro de la brigado Tang Along kun pli ol 80 fortaj junuloj kaj viroj sin ĵetis en Fuĉun-riveron malgraŭ frostoj por elfosi sablon kaj gruzon kaj kontentigis la bezonon de la konstruado. Tiamaniere ili pene laboris dum du vintroj kaj du printempoj, kaj plenumis la taskon uzinte nur 15,000 juanojn kaj 50,000 labortagojn.


Hodiaŭ, reto de irigaciaj kanaloj formiĝis sur la sablobenko. Kaj miljara sabla tero fariĝis rizkampoj, kaj la kampoj, kies rikolto dependis de la naturo, ŝanĝiĝis en kampojn de alta stabila produkto. En 1971, la brigado akiris la dekan riĉan rikolton post naŭ sinsekvaj. La meznombra pomua produktokvanto atingis 725 kg., t.e. 6-oblo de tiu de la ko-

menca periodo post la Liberiĝo. Ili liveris al la ŝtato 175 tunojn da greno, kaj porkojn, fiŝojn, oleonajn produktaĵojn kaj aliajn flankokupajn produktaĵojn. La komunumanoj ricevis po 275 kg. da greno por konsumo kaj krome 130 juanojn. La plejparto el ili havas superbezonan grenon kaj ŝpardeponon en banko.

Akvo verdigis la sablan terenon. Mejjong-brigado ne nur akiris riĉan rikolton de greno en sinsekvaj jaroj, sed ankaŭ plantis 800 muojn da fruktoarboj kaj aliaj arboj. Kaj en la ĝardenoj, fruktoj aromas en ĉiuj sezonoj. La jara produktokvanto de fruktoj atingis 150 tunojn. Tiu flankokupo akiris multe da mono por disvolvi agrikulturon kaj akvoutiligan konstruadon. En 1971, la totala produktita valoro de la brigado atingis pli ol 450,000 juanojn t.e. pli ol-5-oblo de tiu de 1956. Krom la fundamenta konstruado de kampoj, la brigado aĉetis unu plian traktoron, 5 mantraktorojn, 2 maŝinojn por ŝprucigo de insekticido, 2 motorajn velŝipojn kaj 115 aliajn instrumentojn kaj maŝinojn por prilaborado de produktaĵoj, kiuj funkcias en irigaciado, prilaborado kaj transportado, kaj efektiviĝis elektrigo kaj mekanikigo aŭ duonmekanikigo de tiuj laboroj.

Oni priskribis la novan fizionomion de Mejjong per jenaj versoj:

*Urbo Tonglu apud Fuĉun-rivero*





*Kadroj kaj komunumano de Mejjong-brigado interkonsiliĝas por fortigi rizidojn.*

*Dezertis la naŭ-lia longa sablobenko,  
sed nun ĝi jam fariĝis loko de trezoroj.  
Abundas sur ĝi grenoj, arboj kaj dombestoj,  
kaj kvarsezone ŝvebas bonodoroj.  
Elektre ni lumigas, faras prilaborojn,  
kaj irigacias pumpe per motoroj.  
La popolkomunumo — la feliĉa vojo,  
al la socialismo strebas niaj koroj.*

Estas multaj lokoj similaj al tiu de Mejjong-brigado, kie okazis grandskala akvoutiliga konstruado.

Sur la norda bordo de la rivero estas Huangtian-fan triflanke ĉirkaŭata de montoj kaj iom simila al kaldrono. En la pasinteco, ĉiufoje kiam inundo okazis, la rivero verŝis sian akvon en ĝin kaj la inundakvo estis nedrenebla, tiel ke 30,000 el ĝiaj 40,000 muoj da kampoj dronis en akvo. Hodiaŭ, tie jam konstruiĝis kontraŭinunda digo longa je 3.5 km., 2 akvodrenaj kluzoj kaj 1 elektra pumpstacio de sepcent kilovatoj, kiuj bone efikas en prevento kontraŭ inundo.

Proksime de la rivero, Tonglu-gubernio fosis la irigacian kanalon Suda Kanalo de Fuĉun-rivero,

por irigacii kampojn per akvo kondukita el la akvo-konservejo de la Fuĉun-rivera Hidroelektrejo. La kanalo je 35 km. longa fluas de okcidento orienten tra 29 tuneloj kaj 13 riveretoj. Pli ol 10,000 komunumanoj el 7 komunumoj partoprenis en la konstruado. Per la kolektivaj fortoj kaj saĝo ili plenumis en 1½ jaroj la taskon kiu laŭ la plano bezonus 3 jarojn. La kanalo povas irigacii pli ol 30,000 muojn da kampoj kaj ŝanĝi kelkmil muojn da sabloza tero kaj leŭsaj montetoj en rizkampojn.

En la vaste disvolviĝanta amasa movado lerni de Daĝaj, la brava diligenta loĝantaro sur ambaŭ bordoj de Fuĉun-rivero konstruis multe da akvoutiligaj konstruaĵoj, per kiuj ili ŝanĝis tiun regionon en riĉan produkteman de fiŝoj kaj rizo. Nun, la areo de kampoj de stabila alta produkto malgraŭ sekeco aŭ tromulteco de pluvo apud la rivero pli grandigis ĝis 16,000 hektaroj, kiuj okupas 82% de la tuta agra areo, t.e. 50% pli multe ol tiu antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio. En 1971, la meznombra pomua produktokvanto de 20 komunumoj de tiu regiono superis 500 kg. Plene disvolviĝis tie ankaŭ forstumado, brutobredado, fiŝado kaj aliaj flankokupoj.



# El Popola Ĉinio

Esperanta Monata Ilustrita  
Specimeno akirebla senpage

**ABONTARIFO:** 1 jaro £ 0.50 Can.\$ 2.00  
2 jaroj £ 0.75 Can.\$ 3.00  
3 jaroj £ 1.00 Can.\$ 4.00

**ABONU:** Ĉe niaj perantoj en diversaj landoj  
aŭ rekte ĉe la Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo,  
P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Ĉiu abonanto por la jaro 1973, kiu faros  
abonon antaŭ la 31-a de la venonta januaro,  
ricevos belan esperantan bild-kalendaron.



# Ĉina Kverka Silkaĵo

**E**N la vasta montetaro de la orienta parto de Liaŭning-provinco de nordorienta Ĉinio, sin trovas densaj kverkaroj. En printempo kaj aŭtuno, la kverkaroj por bredado de kverkaj silkraŭpoj estas aparte freŝaj kaj bonordaj, ke eĉ formiko ne troveblas en ili, dank' al diligenta flegado de popolkomunumanoj.

De la antikveco, Ĉinio jam famiĝis tra la mondo per produkto de silko. Bone konata estas nia morusa silko kaj ankaŭ nia kverka silko de longe jam estas vendata tra la mondo.

Ĉinio havas longan historion de bredado de silkraŭpoj per kverkaj folioj por produktado de silko.

*Teknikisto lernigas al gejunuloj kiel elekti bombiksojn.*







Teksaĵoj el silko produktita de kverkaj silkraŭpoj



Transmetado de silkraŭpoj




La Fengceng-a Silkoteksejo de Liauning ekstraktis altvaloran kuracilon el pupoj de kverkaj silkraŭpoj. La foto montras, ke teknikistino kaj laboristino faras ekzamenon.








Kverka silkraūpo



Bombikso

Transformiĝaj stadioj de kverka silkraūpo: pupo, bombikso, ovo kaj raūpo





Riĉa rikolto de kokonoj  
de kverkaj silkraŭpoj

Laboristinoj de silko-  
teksejo en laboro





En ĉina historia verko estis skribite en 26 p.K., ke “monton kovras kokonoj de sovaĝaj silkraŭpoj, kiuj utilas al homoj”. Tio ĝuste temas pri kverka silkraŭpo. Post la deka jarcento p.K. oni komencis elbobeni kokonojn de kverkaj silkraŭpoj por teksti silkaĵojn, kaj de tiam la afero senĉese disvolviĝis kaj disvastiĝis.

Bredado de kverkaj silkraŭpoj komenciĝis de Ŝandong-provinco kaj poste disvastiĝis al pli ol 10 provincoj kaj regionoj, kun Ŝandong, Henan kaj Liaŭning kiel centro. Nun la bredado de kverkaj silkraŭpoj kaj produktado de kverkaj silkaĵoj de Liaŭning estas same famaj, kiel tiuj de Ŝandong kaj Henan. Ĝi ne nur okupas la unuan lokon en produktokvanto de kverka silko en la tuta Ĉinio, sed ankaŭ fame konatiĝis kiel produktejo de bona specio de kverka silkraŭpo en la lando.

Ne nur la nutraĵo sed ankaŭ la bredda metodo de la kverka silkraŭpo diferencas de tiuj de la morus-arba silkraŭpo. La lasta estas bredata en ĉambro, dum la unua sur kverko. Ĉar la kverkaj silkraŭpoj estas bredataj en natura kverkaro, ili devas akomodiĝi al la variaj klimataj kondiĉoj, kaj la kverkaj folioj estas riĉaj je proteino kaj karbonhidrato, tial ili estas fortikaj kaj sekrecias silkon de alta rezisteco kontraŭ tiro. La longeco de ĝia fibro ĝenerale estas ĉirkaŭ 800 metroj kaj la plej longa atingas 1,200 metrojn.

Ĉar la kverkaj silkraŭpoj estas bredataj subĉiele, ili estas multe influataj de naturaj kondiĉoj kaj minacataj de atakoj de fiinsektoj aŭ birdoj. Tial, la bredistoj devas elekti konvenajn sezonojn por bredado laŭ lokaj spertoj kaj bone ordigi kverkaran bredejon. Dum la bredado, oni devas doni grandan atenton por ke la silkraŭpoj evitu atakon de malsanoj, insektoj, birdoj kaj bestoj. La bredistoj de diversaj lokoj jam akiris riĉajn spertojn en sia longa produkta praktikado. Post la Liberiĝo, la Partio kaj registaro donis fortan subtenon al bredado de kverkaj silkraŭpoj, helpis la bredistojn solvi malfacilojn, difinis racion prezon de kokonoj kaj speciale instalas scienc-esploran instituton de kverkaj silkraŭpoj, kiu trovis efikajn rimedojn por preventi malsanojn, tiel ke la produktokvanto de kokonoj ĉiam pli altiĝas.

Kun la disvolviĝo de bredado de kverkaj silkraŭpoj progresas la ŝpinteksa industrio de kverka silko.

Niaj teksaĵoj de kverka silko estas malpezaj kaj fortikaj, variaj en specoj kaj havas kompare grandajn akvosorbivon kaj akvovaporigivon, tial ili havas grandan debiton en multaj landoj. La henan-aj kaj ŝandong-aj silkaj teksaĵoj produktitaj per specialaj man-teksiloj el rondaj silkaj fibroj kun neglata surfaco posedas aparte plaĉan guston. Multaj molaj silkaĵoj teksitaj per maŝinoj en Liaŭning kaj Kingdaŭ kun glata kaj brila surfaco estas plej bona materialo por diversaj ĉemizoj. Krome, oni produktas ankaŭ diversspecajn delikatajn kaj kolorajn silkaĵojn tinkturitajn kaj presitajn, kiuj en brilaj koloroj kaj kun belaj desegnoj aspektas elegante. La esplora instituto de kverkaj silkaĵoj ankaŭ kreis novan specon de kverka silkaĵo traktita per rezino. Ĝi estas mola, ne perdas kolorojn, ne kuntiriĝas post lavado, rezistas kontraŭ akva makulo, kaj ankaŭ konservas la karakterojn de agrableco kaj fortikeco, tial ĝi estas aparte ŝatata de la klientoj.

Kromsia alta fortikeco, la kverka silko havas ankaŭ rimarkindajn kapablojn de rezisto kontraŭ acido kaj alkalo kaj de izolado k.a. bonaj fizikaj ecoj. Tial ĝi povas esti uzata ne nur kiel altgrada materialo por produkti diversajn vestojn kaj ornamaĵojn, sed ankaŭ kiel grava materialo por kelkaj industrioj.

Abundas kverkoj preskaŭ en nia tuta lando. La regionoj de bredado de kverkaj silkraŭpoj pli kaj pli vastiĝas kaj ankaŭ la produktado de kverkaj silkaĵoj estas en senĉesa disvolviĝo.



# Ten Poploj kaj Salikoj . . .

*Jen poploj kaj salikoj staras en linioj.*

*“Ja kiuj tiujn arbojn siatempe plantis?”  
Infanoj de l’ vilaĝ’ kapskuis pro nescio,  
al la geavoj ili tion pridemandis.*

*“Noktmeze antaŭ tridek jaroj alrapidis  
kaj kamps okavoja armetrup’ post peno.  
Anstataŭ l’ batalantojn tamen ni nur vidis  
la novajn arbovicojn en la fru-mateno.*

*“Sur arbotrunk’ sin montris jen memoraj vortoj:  
‘Post liberiĝo de la tuta patra tero,  
revenos ni, novigos ĝin per ĉiuj fortoj;  
kaj tiam ruĝaj flagoj flirtos en l’ aero.’*

*“Forpasis de la tago tridek plenaj jaroj,  
kaj l’ arboj verde ombras jam la vojlinion.  
Ankoraŭ ne revenis tiuj homoj karaj —  
ĉe landolimo ili gardas la patrion.*

*“Sur la montaro Kunlun, sur l’ Orienta Maro,  
en sudo de Jangzi kaj trans la Grandmur-baro,  
ŝvitadas, sangas ili serve al popolo  
kaj ĉie bele floras la Feliĉo-floro.*


*“Dum jaroj de batalo, kiuj fajre ardis,  
ni ĉiam sopiradis al l’ armeo kara,  
kiu en ŝtormo ĉie la patrion gardis,  
kaj certe tenis Zaŭlin en memoro klara.*

*“Firmaŝe l’ zaŭlin-anoj sekvis la Partion,  
dum tridek ŝtormaj jaroj de revolucio;  
jam tridekfoje l’ arboj ŝanĝis la foliojn  
kaj levis sin heroa nov-generacio.*

*“Ĉen Erbaŭ, rekrutit’ de l’ antaŭlasta jaro,  
Malgranda Dongcaj, rekrutita lastajare,  
komunumanoj, kiuj iras sub l’ arbaro,  
ploton’ milica, kiu trejnas sin batale:*

*“En vento, jen la poploj per senĉesaj bruoj  
admonas: ‘Bone gardu niajn marojn, montojn.’  
En pluvo la salikoj jen per branĉoskuoj  
stimulas vin en brava marŝo al l’ estonto.*

*“Jen poploj kaj salikoj staras en linioj,  
sopiras al karuloj ni kun emocio;  
la arbojn ni memoru, pro l’ revolucio,  
ke ĉiam daŭru nia glora tradicio.”*





# Malgranda Sonoriganto

*(Literaturaĵo por Geknaboj)*

**P**ANJO, panjo! Kial paĉjo ankoraŭ ne revenis?”

Apenaŭ finiĝis la arĝente sonoraj vortoj, vigla knabo jam sin ĵetis en la domon. Li estas dekjara, forta kiel tigrido kun paro da grandaj rondaj okuloj. Pro lia aspekto, lia patro, vicestro de la produktita grupo, nomis lin Huzi (tigrido en la ĉina lingvo).

Lia patrino, kudranta ŝuplandumon en lamplumo, ĵetis rigardon al li kaj demandis: “Kie vi ludadis?”

“Mi atendis paĉjon sur la vojo.”

“Paĉjo eble ne revenos.”

“Ne revenos? Neeble, neeble. . . Paĉjo diris matene je sia foriro, ke li nepre revenos hodiaŭ.” Tion dirante per la buŝo, Huzi tamen ekmeditis en la cerbo: Ho jes, ĉiufoje kiam paĉjo iris matene al la vendejo 35 liojn fora por alporti kemian sterkon per ĉaro, li revenis senescepte antaŭ krepuskiĝo. Kial do li ankoraŭ ne revenis je tiel malfrua horo? Se li ne revenos ĉinokte, kiu do sonorigos por eklaboro morgaŭ matene?

Antaŭ nelonge, la maljuna grupestro persone zorgis pri sonorigado kaj labordivido. Antaŭ dek tagoj, li subite malsaniĝis, tiam do la du taskoj falis sur paĉjon. Ĉiuvespere, paĉjo iris al la grupestro por vidi lian sanstaton kaj interparoli kun li pri la produktado de la grupo. La maljuna grupestro ofte donis al li konsilojn pri labordivido de la grupo. Sed paĉjo ankoraŭ ne revenis je tiel malfrua horo. Post medito, Huzi diris al si en la koro: Nia ins-

truisto ja ofte diris, ke ni faru bonojn por la grupo. Nu, mi sonorigos anstataŭ paĉjo. Sed post la sonorigado, oni ankoraŭ devas asigni laborojn al la komunumanoj, kio ja ne estas petolaĵo. Je penso pri tio, li glitis el la domo kiel fumo en vento, eĉ ne aŭdinte kion panjo kriis post li.

Je unu spiro Huzi kuris en la domon de la maljuna grupestro. Apenaŭ enpaŝinte la pordon, li demandis sen salutaj vortoj: “Onklo grupestro, mia patro ankoraŭ ne revenis. Kiujn laborojn oni faru morgaŭ? Diru al mi, ke mi transdiru vian opinion al mia patro post lia reveno en la nokto.”

Karesante la kapon de Huzi, la maljuna grupestro diris kun rideto: “Ho, Huzi ja estas knabo kun grandaj zorgoj!” Kaj poste li diris al Huzi la farendajn laborojn en la sekvanta tago. La maljuna grupestro diris: “Memoru, ke sonorila signalo estu donita ĝustatempe. Post la kolektiĝo de la komunumanoj, diru al la virinoj, ke ili pluku avenojn en la semo-kultura kampo oriente de nia vilaĝo kaj la viroj disŝutu kemian sterkon en la miliaj kampoj kaj poste akvumu ilin.”

“Jes, mi memoros.” Apenaŭ finiĝis la vortoj de la maljuna grupestro, Huzi jam saltis el la pordo.

Saltetante Huzi kuris en sian hejmon. Vidante lin en tia animstato, la patrino diris ŝajnigante koleriĝon: “Ci petoluleto simila al leporo kuradas tien kaj reen dum la tago kaj eĉ ne ripozas en nokta horo. Ja kien ci iris?”

“Koncerne al mi,” diris Huzi skuante la kapon

por inciti la patrino. “mi iris por ricevi tre tre gravan taskon.”

“Kion!” diris la mirigita patrino. “Kian gravegan taskon?”

Kun elstarigita brusto kaj palpebrumantaj tigrigraj okuloj, Huzi diris serioze imitante parolmanieron de plenaĝulo: “Por la nuna tempo mi ankoraŭ devas ĝin teni en sekreto. Tiel aŭ aliel vi tamen ekscios ĝin morgaŭ.”

Vidante, ke Huzi ŝercas, ŝi ne plu demandis pri tio kaj diris al li: “Tuj enlitigu! Vi devos iri al la lernejo morgaŭ matene!”

Huzi glitis sub la vatitan litkovrilon sen demeto de la vestoj. Li kalkulis, ke tio ŝparos al li tempon. Li iros frapi la sonorilon tuj post ekkrio de kokoj. Sed kiel signali per la sonorilo? Laŭ la maniero de paĉjo po-dufrape: tintin — tintin —.

En la mateno kiam paĉjo unuafoje signalis per la sonorilo, li vekis Huzi dum sia ellitiĝo per pretervola ektuŝo. Huzi lin demandis: “Paĉjo, kial vi ellitiĝas tiel frue?” Paĉjo diris: “Ĉu vi ne vidas, ke baldaŭ elkrepuskiĝos? Mi devos iri frapi la sonorilon tuj post komenco de kokokrio. La maljuna grupestro rimarkigis al mi, ke la komunumanoj ripozas ne sufiĉe, se mi sonorigos tro frue; kaj la laboroj ne estos plenumitaj ĝustatempe, se mi sonorigos malfrue. Mi nepre sonorigos je la ĝusta horo.” Pensante pri tio, Huzi denove maltrankviliĝis: “Se mi profunde endormiĝos, ne aŭdos kokokrion kaj sonorigos malfrue, tiam estos fuŝo. Kion fari do?” Post momenta pripenso, Huzi subite pugnis sian maneton kaj ekfrapis per ĝi sian kapon: “Kia stultulo! Jes, mi prenos la kokon en la domon.” Tion dirinte, li senbrue ellitiĝis kaj iris el la ĉambro sur la piedpintoj, sen surmeto de la ŝuoj. La korto plenis de arĝenta lunlumo kaj estis aparte hela. Huzi iris al la kokejo ĉe la sudokcidenta angulo kaj jetis rigardon en ĝin: La granda koko senmove dormas sur la framo, kun retirita kolo kaj fermitaj okuloj.

Huzi ĝoje reiris en la domon, tenante la kokon en sia sino. Sed bedaŭrinde, ĝuste je la momento kiam li transpaŝis la sojlon, la koko ekbaraktis kaj Huzi brue ektuŝis la pordofolion per sia kubuto. Patrino vekigis pro la surprizo kaj tuj demandis: “Kiu?” Tion dirante ŝi jam volis leviĝi.

Pro timo, Huzi eĉ ne kuraĝis spiri kaj haste respondis balbute: “Estas mi. Mi — Huzi.”

“Vi Huzi, pro kio vi eliris en tiel malfrua horo?”

“Pro nenio.” Sed Huzi tuj rimarkis, ke la respondo ne taŭgas, kaj li tuj faris korekton: “Mi iris al necesejo.” Tion dirante li senbrue metis la kokon sur la plankon kaj glitis sub la vatitan litkovrilon. Li ne sciis, kiam li endormiĝis.

Kokerik! Laŭte ekkriis la saĝa granda koko kun longe etendita kolo.

Huzi vekigis. Li saltis de sur la terlito kaj kuris el la domo tenante siajn ŝuojn en mano. La patrino ankoraŭ ne komprenis kio okazis. Nur kiam aŭdiĝis alia kokokrio, ŝi ekkomprenis la okazaĵon kaj diris al si mem: “Ha, li iris frapi la sonorilon.”

Simile al ĉevalido, Huzi saltante kuris al la arbego antaŭ la bredejo, de kiu pendis la sonorilo. Lia koro vere pleniĝis de ĝojo: “Baldaŭ mi Huzi signalos ĝustatempe per sonorilo la eklaboran horon de la komunumanoj de la tuta grupo. Kiel mi povus min deteni de ĝojo?” Sed kiam li venis sub la sonorilon, li trovis, ke lia volo estas tre malfacile plenumbla. Vidu, la fera marteletto uzata por frapi la sonorilon pendas sur alta branĉo. Huzi klopodadis ĝin depreni starante sur la piedpintoj, tamen lia mano ne povis ĝin atingi. Mankis al li alteco de unu pugno. Kion fari? Jen, venis al li ideo! Ambaŭ mane premante la trunkon de la arbo, rapide li surgrimpis ĝin, deprenis la marteleton kaj saltis sur la teron.

Huzi levis la marteleton kaj volis ekfrapi la randon de la sonorilo, sed tiam li subite trovis, ke la sonorilo pendas alte. Huzi sentis, kvazaŭ kato gratus lian koron kaj li diris piedfrapante la teron: “Ve! Brula situacio! Kiel bone estus, se mi estus tiel alta kiel paĉjo...”

La maljuna grupestro vekigis tuj post aŭdiĝo de kokokrio. Li tre miris, ke la sonorilo ankoraŭ ne sonas, kiam jam tagiĝis. Kiam li estis senbutonume portinta sian jakon kaj ellitiĝonta, subite la sonorilo eksonis: tintin — tintin —.

Ju pli longe la maljuna grupestro aŭskultis, des pli akre li sentis, ke la sonorado ne estas tiel klara. Kiu frapas la sonorilon? Sin helpante per bastono en la mano, li iris al la loko de la sonorilo kaj vidis de malproksime, ke staras knabo sur la teramaso, kie oni kutime disdonis laborojn. Kaj per atenta rigardo li trovis, ke li estas neniu alia ol Huzi. Nur nun li komprenis, kial hieraŭ nokte Huzi vizitis lin kaj sagace demandis al li pri farendaj laboroj.

Dume, aŭdinte la sonoradon, arope venis komunumanoj de diversaj direktoj sub la grandan soforon. Ili jetis rigardon sur la teramason, sed vidis





nek la vicgrupestron nek la maljunan grupestron, nur Huzi staris sur ĝi kiel heroo, kun ligna martelo en la mano, pli alta ol lia staturo. Tiun martelon li saĝe decidis uzi kiel frapilon je la urĝa bezono kaj alportis flugrapide de sia hejmo.

Huzi ĉirkaŭrigardis per siaj rondaj okuloj kaj konstatis, ke preskaŭ ĉiuj komunumanoj jam alvenis, li do diris plengorĝe imitante la parolan manieron de paĉjo: “Komunumanoj —” Sed li tuj englutis la vortojn sur la lango kaj diris en ŝanĝita tono: “Oho, mi eraris, ne komunumanoj sed onkloj kaj pliaĝaj fratinoj! La maljuna grupestro diris, ke vi iru en la semo-kulturan kampon oriente de la vilaĝo por pluki avenon.”

Kelkaj petolemaj knabinoj ekridis brue je lia parolo.

“Kaj ni viroj?” Junulo kromnomata Kanono ŝerce demandis Huzi.

“Vi. . .vi. . .” Huzi balbutis, ĉar li trovis, ke lia patro, kiu iris alporti kemian sterkon, ankoraŭ ne revenis, kiel do li povus asigni al la viroj la laboron de disŝutado de kemia sterko en la miliaj kampoj laŭ la aranĝo de la maljuna grupestro? Ŝviteroj aperis sur la nazpinto de Huzi pro maltrankviliĝo. Post longa cerbumo, subite Huzi ekmemoris

la konsilon de la instruisto, ke oni devas sin apogi sur la amasoj por venki malfacilon. Jes, li devis interkonsiliĝi kun la onkloj! Kaj li ekmovis sian buŝon: “La maljuna grupestro diris, ke la viroj disŝutu kemian sterkon en la milia kampo kaj ĝin irigacii posttagmeze. Sed mia patro ankoraŭ ne alportis kemian sterkon...”

Kia hazardo! Apenaŭ finiĝis la vortoj de Huzi, laŭta potenca voĉo alflugis de la vojo en la sudo.

Ĉiuj turnis sian rigardon al tiu direkto kaj trovis, ke la vicgrupestro alportas kemian sterkon. Je vido de la patro kaj kemia sterko, Huzi trankviliĝis kaj diris kun laŭtigita voĉo: “Ni agu laŭ la plano, la viroj disŝutu kemian sterkon laŭ la ordono de la maljuna grupestro.”

Manklakado eksonis en la homamaso.

La maljuna grupestro iris tra la homoj sur la teramason kaj frapante la ŝultron de Huzi li diris kun rideto: “Hehe, nia malgranda Huzi estas vere kapabla!”

La koro de Huzi pleniĝis de ĝojo.

Dume, la ruĝa suno jam leviĝis de sur la verda kamparo kaj ruĝigis la ridetantajn vizaĝojn de la komunumanoj, kvazaŭ dirante: Huzi jam plenumis sian tre tre gravan taskon.

# Ĉanghe — Produktejo de Pajlaj Ĉapeloj

ĈANGHE-POPOLKOMUNUMO de Cihi-gubernio, Ĝegiang-provinco, estas unu el niajproduktejoj de pajlaj ĉapeloj kun longa historio de tiu metio.

Post la Liberiĝo, la Partio kaj la registaro donis atenton pri la metio de pajlaj plektaĵoj kaj helpis Ĉanghe-ajn plektistojn starigi Instituton por Teknika Plibonigo kaj fondis ŝtatan farejon de pajlaj ĉapeloj por disvolvi la produkton kaj altigi la kvaliton de pajlaj ĉapeloj. Nun estas establita en Cihi-gubernio 10 helpaj punktoj de pajlplekta arto, por ke ili helpu la popolkomunumojn disvolvi amasan plektadon de pajlaj ĉapeloj kaj bazarkorboj. Nun en la tuta gubernio pli ol 50,000 loĝantoj sin okupas tutjare pri pajlplektado. En la jaro 1971, Ĉanghepopolkomunumo sola jam produktis 900,000 pajlplektaĵojn kaj ĝia totala produktita valoro atingis pli ol 649,000 juanojn. Ĉijare, en la unua sezono la komunumo jam faris pli ol 320,000 diversformajn pajlajn ĉapelojn kaj pli ol 110,000 grandajn kaj malgrandajn bazarkorbojn, t.e. je kvaroblo pli alte kompare kun produktokvanto de la sama periodo de la

pasinta jaro. Nun tiuj produktaĵoj estas senĉese eksportataj al pli ol 60 landoj inkluzive de Anglio, Francio, Italio, Japanio kaj Kanado.

Antaŭe la materialoj por pajlaj plektaĵoj en Ĉanghe grandparte devis esti liverataj de aliaj lokoj kaj pro tio la produkto de tiu metio estis certgrade limigita. Sed nun, oni uzas lokajn materialojn kaj faris variajn plektaĵojn el diversaj naturaj materialoj. Antaŭe ili uzis nur specialan herbon, sed nun ili uzas tigojn de tritiko kaj aliaj plantoj por plekti ĉapojn, korbojn, ventumilojn, subtasojn, lampŝirmilojn kaj aliajn objektojn. En la lastaj jaroj, por plimultigi fontojn de materialoj, ili kulturebligis pli ol 6,300 muojn da tero sur mara strando speciale por taŭgaj herboj en kelkaj apudmaraj komunumoj kaj ŝtataj agrikultivejoj. Ĉiujare ili meznombreakoltis pli ol 2,000 tunojn da herbajoj, kio unuapaŝe kontentigis la bezonon de plektado.

La specoj de Ĉanghe-aj pajlplektaĵoj rapide multigis dank' al uzo de diversaj materialoj. Nun, pli ol du cent varioj de pajlaj ĉapeloj kaj bazarkorboj estas produktitaj, inter kiuj estas porornamaj



*Plektado de Pajlaj ĉapeloj*





*Elegantaj pajlaj korboj*

ĉapoj, laborĉapoj, ĉapeloj, infanaj ĉapetoj, ludil-ĉapoj kaj aliaj de varia grandeco por viroj kaj virinoj kaj bazarkorboj en formoj de boato, koka koro kaj kolora lanterno.

En la lastaj jaroj, nombro da diplomitaj studentoj venis en la metiejon kaj organiziĝis grupo por teknika renovigo kun partopreno de laboristoj, teknikistoj kaj kadroj. Kuraĝe heredante la tradician arton de plektado kaj resumante progresintajn spertojn ili senĉese disvolvis aktivadojn de teknika renovigo. Foje iu projektisto vidis, ke oraj fiŝoj vikle naĝas en akvo, kaj estis inspirita de tio. Reveninte en la metiejon li unue prove faris desegnon subtenate de la gvidantoj kaj poste donis ĝin al plektistino por fari modelon. Laŭ opinioj de la kamaradoj pri la modelo la projektisto foje kaj refoje plibonigis la desegnon. Nun oni lerte inkrustis pajlan ĉapelon per du vikle naĝantaj oraj fiŝoj zorge projektitaj kaj multe beligis ĝin. Sur la diversformaj pajlaj produktaĵoj faritaj de ili estas videblaj variaj novaj desegnoj. Iuj pajlaj ĉapeloj estas ornamitaj per oraj fiŝoj, aliaj per papilioj; kaj iuj tritiktigaj korboj portas sur si vivecajn figurojn de pandoj. Tiuj plektaĵoj ĝuas laŭdon en- kaj ekster-lande pro siaj fajna plektado, brilaj koloroj kaj plaĉaj ornamoj.



### MAKULA CERVO

Makula cervo, valora besto en Ĉangbaj-montaro de nordorienta Ĉinio, estis sukcese generita en Huanggin-drogejo de Hinning-gubernio, Hunan-provinco.

Hinning-gubernio situas en montregiono abunda je arboj, herboj kaj akvo, tio estas favora kondiĉo por cervobredado. En la pasinta novembro, la ŝtata Huanggin-drogejo kondukis 40 makulajn cervojn de Gilin-provinco, kaj ili estas zorgeme bredataj kaj kreskas fortike kaj grase. Nun, la cervinoj jam naskis sian idon kaj junaj

kornoj de 4 vircervoj jam estis segite rikoltitaj

### PLIPRODUKTO DE KOLZA SEMO

La produkta kvanto de kolza semo multe kreskis ĉijare. Laŭ statistiko de la ĉefaj produktejoj — Ŝanhajo, Giangsu, Ĝiang, Anhuj, Gianghi, Hubej, Hunan, Siĉuan, Junnan, Gujĝoŭ kaj Ŝenhi, ĝia totala produktokvanto kreskis je 20% ol tiu de 1971, en kiu la produkta kvanto de kolza semo estis plej alta en la historio.

Kolzo estas unu el niaj ĉefaj oleplantaĵoj. Ĝia semita areo okupas 40% de la totala areo por oleplantaĵoj, kaj ĝia produktokvanto konsistigas trionon de la totala produktokvanto de oleplantaĵoj. Kaj la produktokvanto de kolzo semita en aŭtuna fino okupas 90% de ĝia totala produktokvanto. Ĝi kreskas plejparte en la baseno de Jangzi-rivero.

# Gazetoj el Ĉinio

**Pekina Revuo** — Semajna gazeto de politiko kaj teorio. Ĝi aperas en la angla, franca, germana, hispana kaj japana lingvoj kaj estas distribuata aerpoŝte tra la mondo.

**Ĉinio** — Grandformata monata gazeto kun belaj bildoj kaj lakonaj tekstoj. Ĝi aperas en la ĉina, angla, franca, germana, japana, rusa, hispana, araba, hindia, indonezia, itala, sveda, korea, ŝahilia, urdua kaj vjetnama lingvoj.

**Ĉinio en Konstruado** — Monata gazeto riĉe ilustrita kun ĝenerala enhavo. Ĝi aperas en la angla, franca, hispana, araba kaj rusa lingvoj.

**Ĉina Literaturo** — Literatura kaj arta gazeto eldonata monate en la angla lingvo kaj trimestre en la franca.

**Popola Ĉinio** — Monata gazeto kun ĝenerala enhavo eldonata en la japana lingvo.

Akcepto de abonoj por la jaro 1973 komenciĝas nun. Bonvole abonu la gazetojn. Katalogo estas sendata laŭ peto.

**Distribuas:** Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵo), Pekino, Ĉinio.

Abonu ĉe lokaj agentejoj aŭ rekte ĉe Gazeta Fako, Guozi Shudian, P. O. Kesto 399, Pekino, Ĉinio.





# Ŝuoj Eksterordinare Grandaj

ĜENG NAN

**A**NTAŬ nelonge, Liang Hongtian, Ĝuang-nacieca komunumano de Nanpo-komunumo de Ĝinghi-gubernio de la Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono, refoje ricevis paron da sportaj ŝuoj kun eksterordinara grandeco senditan de la Gujlin-a Kaŭĉuka Fabriko. Oni demandis lin: "Kial vi povas konstante ricevi ŝuojn de Gujlin kaj Ŝanhajo, kie vi ne havas parencon?" Li ĝoje respondis: "Dank' al la gvido de Prezidanto Maŭ, mi havas parencojn ĉie en nia socialisma patrolando." Dum kvar sinsekvaj jaroj, li jam ricevis 6 parojn da sportaj ŝuoj kun eksterordinara grandeco el Ŝanhajo kaj Gujlin.

Liang Hongtian estas bona komunumano amanta la socialisman kolektivon kaj laboron. Li estas fortika, kaj liaj piedoj tre grandaj. En magazenoj ne troviĝas sportaj ŝuoj taŭgaj por li. Li estas longe ĝenata de tio, ke li ne povas havigi al si sportajn ŝuojn. Huang Jongli, sekretario de la partia filio de la brigado, delonge rimarkis tion. Ĉiufoje, kiam li iris en alian lokon por kunveni, li nepre iris en magazenojn por vidi ĉu tie troviĝas sportaj ŝuoj taŭgaj por Liang Hongtian, sed neniam li sukcesis.

En 1968, Huang Jongli legis en ĵurnalo, ke ŝanhajaj laboristoj iris unuj post aliaj en kamparon por enketi kaj esplori kun la celo plibonigi siajn produktojn kaj kontentigi la bezonon de la vastaj amasoj de kamparanoj. Li tuj skribis leteron al la Kvina Kaŭĉuka Fabriko de Ŝanhajo kaj petis

laboristojn fari sportajn ŝuojn kun longeco de 1/3 metro por Liang Hongtian.

Leginte la leteron el limregiono de suda Ĉinio, la revolucia komitato de la fabriko tuj diskutis pri tio. Ili opiniis, ke estas nerifuzebla devo de la laborista klaso produkti sportajn ŝuojn kun eksterordinara grandeco por ke kamparanoj pli bone konstruu novan socialisman kamparon. Post nelonge, paro da sportaj ŝuoj kun longeco de 1/3 metro kaj larĝeco de 13 centimetroj farita en Ŝanhajo estis ricevita de Liang Hongtian.


Kiam la novaĵo pri ricevo de la eksterordinaraj sportaj ŝuoj disvastiĝis en la hejmvilaĝo de Liang Hongtian, liaj samlokanoj tre ĝojis pro tio. Palpante la ŝuojn iu pli ol 70-jara maljunulo diris emocie: "La laboristoj kaj kamparanoj ja estas ligitaj koron kun koro, kvankam ni loĝas fore unuj de la aliaj." Tenante la sportajn ŝuojn per ambaŭ manoj, Liang Hongtian longe ne povis kvietigi sian forte tuŝitan koron. Li ekpensis pri la tagoj antaŭ la Liberiĝo. Kiam la laboruloj eĉ ne povis sin vivteni por ne paroli pri aĉeto de sportaj ŝuoj. En 1949, li estis kaptita de kuomintanga armeo kaj devis servi kiel ĝia vektoportisto. Nudpiede li iris 200 kilometrojn, kaj ĉiupaŝe sur la monta vojeto, akra doloro turmentis lin. Post la Liberiĝo, li fariĝis mastro de la lando kiel la tutlanda popolo kaj vivas pli kaj pli feliĉe. Nun, ŝanhajaj laboris-

toj eĉ faris por li sportajn ŝuojn kun eksterordinara grandeco. Li decidis lerni de la laborista klaso kaj pli multe kontribui al la konstruado de nova socialisma kamparo.

Post nelonge, la Ŝanhaja Kvina Kaŭĉuka Fabriko demandis lin per letero, ĉu la sportaj ŝuoj bone sidas al liaj piedoj, kaj petis de li kritikon, por ke la fabriko produktu pli taŭgajn ŝuojn por li.

Tio maltrankviligis lin. Kiel li povas elmeti kritikon al la laboristoj, se ili jam tiel multe klopodis por li! Sed la antaŭa parto de la ŝuo estas iom malvasta, ĉar la letero de la sekretario ne indikis la dikecon de liaj piedoj. La letero de la ŝanhaja fabriko brilis per klasa sentimento de laboristoj, ĝiaj vortoj manifestis, ke la laboristoj kaj kamparanoj estas samfamilianoj kaj la socialismaj fabrikoj klopodas servi al la popolo sed ne ĉasi profiton. Post pripenso, li skribis kun dankemo sian opinion por plibonigo al la fabriko. Post nelonge, paro da fortikaj kaj bone sidantaj sportaj ŝuoj estis sendita de Ŝanhajo al la montvilaĝo en najbareco de Vjetnamio.

Ĝuste kiel Liang Hongtian diris: En nia patrolando ĉie troviĝas niaj parencoj. Informiĝinte pri tio, laboristoj de la proksima Gujlin-a Kaŭĉuka Fabriko de la aŭtonoma regiono opiniis, ke ili devas produkti sportajn ŝuojn kun eksterordinara grandeco por li. Tial, Liang Hongtian ricevis la sportajn ŝuojn de Gujlin.



# Profunda Amikeco de la Popoloj de Okcidenta Eŭropo al la Ĉina Popolo

**E**N la lastaj jaroj, kun la multiĝo de kontaktoj kiuj pliigis la interkomprenon inter la popoloj de Okcidenta Eŭropo kaj Ĉinio, pli kaj pli profundigis la amikeco inter ili.

Antaŭ nelonge iu pli-ol-60-jara itala skulptisto venis al la ĉina ambasadorejo en Romo kun marmora tablolampo kaj petis transdoni ĝin al Prezidanto Maŭ kiel lian donacon. Li faris ĝin en siaj postlaboraj horoj de pli ol unu jaro. La tablolampo estas skulptita en formo de antikva roma templo subtenata de ses kolonoj sur kiuj troviĝas reliefo de abeloj kaj folioj de kverko. Ĝi aspektas kaj grandioza kaj delikata. La donacanto estis veterana kontraŭfaŝista batalanto en luktado kontraŭ Mussolini-diktaturo. En sia mallonga letero alportita kune kun la donaco li skribis: “Mi havas sinceran amikecon al la tuta ĉina popolo. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ, la ĉina popolo ne timis vivoferon, efektivigis sian belan idealon, liberigis sin el la ungegoj de imperiismo kaj kapitalismo kaj sukcese konstruis prosperan kaj potencan socion.” Klarigante la signifon de la abeloj kaj folioj de kverko li diris: “1, la aktivado de abelo simbolas laboremon; 2, la mielo de abelo dolĉecon; kaj 3, la folioj kaj semoj de kverko sanon kaj longan vivon.”

Tiaj amikoj, kia tiu itala skulptisto kun kora amikeco al Prezidanto Maŭ kaj la ĉina popolo, estas ofte renkonteblaj en landoj de Okcidenta Eŭropo. Okaze de la datreveno de la fondiĝo de ĈPLA en la pasinta jaro, iu preskaŭ 80-jara franca maljunulino sendis leteron al sia ĉina amiko por esprimi sian profundan amikecon al la ĉina popolo. Ŝi skribis: “Mi estas ordinara franca virino kaj ne scipovas skribi belajn frazojn, tamen mi estas malnova amikino de Ĉinio, por kiu mi serĉis solidan kaj fratecan amikecon. Firma estas la amikeco inter popoloj, kiuj komprenas kaj amas unu alian, kaj tiu amika sento estas elkora. Tio ĉi estas mia trezoro kaj feliĉo.”

En Goteborg de Svedio estas maljuna profesoro fervore klopodanta por amikeco inter la popoloj

de Svedio kaj Ĉinio. Kiam la Delegacio de la Ĉinaj Ĵurnalistoj vizitis la urbon, li senlace partoprenis en la akcepta laboro. En dimanĉo li akompanis la delegacion rigardi vidindaĵojn spite al frosteco kaj vespere varme gastigis ĝin en sia hejmo. Li kaj liaj familianoj ĉiuj estas membroj de la Sveda-Ĉina Amikeca Asocio kaj aktivadas por amikeco kaj interkompreniĝo inter la du popoloj. Larsson, pli-ol-50-jara laboristo, vizitis Ĉinion en 1971, kiel membro de la Delegacio de la Sveda-Ĉina Amikeca Asocio. Foje, kiam li pretis ekveturi per trajno en Pekina Stacio por viziti aliajn lokojn, subite li rimarkis, ke li lasis sian monujon en la hotelo. En la sako estis fervoja bileto kaj pli ol mil svedaj kronoj. Li tre maltrankviligis, ĉar li jam ne havis tempon por ĝin preni. Ĝuste en tiu tempo iu servisto de la hotelo alrapidis kaj donis la monujon al li. Tio multe lin kortuŝis. Post sia reveno al Goteborg li rakontis tion al ĉiuj, kiujn li renkontis. Li portis fotojn faritajn en Ĉinio al konstruejo por informi laboristojn pri la nova Ĉinio. En sia artikolo pri la vizito al Ĉinio li skribis: “Mia impresoj povas esti resumita jene: Mi neniam vidis tiel diligentajn kaj feliĉajn popolanojn. Ili estas tiel gajaj ke mi ĉiam esperas reveni inter ilin.”

En Londono, iu librovendejo decidis aranĝi ekspozicion de fotoj pri la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de Ĉinio. Tamen en ĝi estis nur du laborantoj, tial ili ne havis sufiĉe da forto por prepari la ekspozicion kaj zorgi la rigardantojn dum ekspozado. Kiam la mastro de la vendejo diris sian malfacilon al siaj amikoj, kelkaj el ili tuj sin anoncis por helpi. Iu emerita laboristo helpis la vendejon aĉeti materialojn bezonatajn por la ekspozicio kaj fari projekton kaj aranĝon. Du junulinoj venis por helpi ĝin fari montrajn tabulojn por fotoj montrataj en la ekspozicia halo. Iu konstrua laboristo helpis ĝin zorgi vizitantojn. Oni demandis lin: “Ĉu vi povas ne iri al laboro, kiam via familio vivas malfacile kaj via edzino malsaniĝis?” Li ridetis kaj diris: “Prezenti al la brita popolo la progreson de Ĉinio por ke pli multe da





**ARGENTINA LEGANTO  
E.H.G. SKRIBIS:**

Rilate vian gazeton, vi devus en ĉiu numero prezenti novan beletriston, artiston aŭ filozofon, ĉu modernan ĉu antikvan, kaj etan antologion el liaj verkoj. Tiel ni kontaktos kun via tre malnova kulturo, ĉar en niaj enciklopedioj malmulte oni povas legi pri tiu medio; samtempe tre gravas la priskriboj de la laboroj kaj de la vivo de laboristoj en kamparo kaj en urbo. Vi povas rakonti fidele; ĝenerale la okcidentaj ĵurnalistoj kiuj vizitis Ĉinion prezentis al ni raportojn falsitajn kaj partiecajn.

**USONA LEGANTO L.T.  
SKRIBIS:**

Mi jam abonis al "El Popola Ĉinio" de 1971 kaj multe lernis pri via lando, ĝiaj kutimoj kaj historio. Mia opinio ĉiuj artikoloj estas facile legeblaj. La gazeto eĉ pliboniĝas ĉe ĉiu numero. Via bonstila Esperanto estas rekomendinda legaĵo por ĉiuj esperantistoj.

lasta! Cetere, tiu popolokanto donis al mi ankaŭ la unuan kontakton kun la ĉina lingvo (skribkaj parol-maniero). Karaj geamikoj, mi ŝatus iom malpli legi pri la industrio, ktp. (tiun ja havas ĉiu lando). Sed mi ŝatus iom pli legi pri akupunkturo, ĉina geografio kaj trafiko, popolokantoj, la ĉina lingvo (eble kurso por komencantoj?) kaj la ĉina Esperanto-movado.

**GFR-A LEGANTO P. E.  
SKRIBIS:**

Estas vere malfacile skribi la opinion pri la lastaj numeroj de EPĈ, ĉar ili estis tiel diversspecaj. Plej plaĉis al mi la plej lasta, do n-ro 5/1972. Certe estas pro tio, ke ĝi estas pli enhavoriĉa. Mi tre ĝojis, ke vi presis la notojn de ĉina popolokanto, ĉar mi interesiĝas pri popolmuziko. Do, mi esperas, ke tiu ne estis la



britoj komprenu Ĉinion, tio estas signifoplena laboro.”

Liaj vortoj esprimis la sinceran kaj profundan amikecon de la brita popolo al la ĉina popolo.

En Francio dekelkaj filioj de la Franca-Ĉina Amikeca Asocio en Parizo organizis pli ol 60 relative grandajn aktivadojn en la pasinta jaro por disvolvi la amikecon inter la popoloj de Francio kaj Ĉinio. La Franca-Ĉina Amikeca Asocio aranĝis en Liono pli ol 60 aktivadojn pri amikeco inter la du popoloj en tri monatoj. Iu respondeculo de la asocio laŭinvite faris pli ol 50 raportojn pri Ĉinio en Parizo kaj aliaj regionoj kaj ricevis varman bonvenigon de diverstavolaj popolanoj. La Franca-Ĉina Amikeca Asocio ankoraŭ helpis klubojn, junularajn domojn kaj amasajn organizojn de multaj lokoj aranĝi "Ĉinan Semajnon", "Ĉinan Monaton" kaj "Ĉinan Sezonon" por informi la francan popolon pri Ĉinio. Por la amikeco inter la du popoloj, laborantoj de la asocio kaj ĝiaj filioj, multaj

laboristoj, kamparanoj, oficistoj, intelektuloj kaj virinoj ofte laboris ĝis profunda nokto post taga laboro, kaj ili eĉ ne ripozis en sabata vespero kaj dimanĉo. En Svedio pli kaj pli multaj homoj aliĝis al la Sveda-Ĉina Amikeca Asocio. En la pasinta jaro sola tiu asocio jam akiris pli ol mil novajn membrojn. Nun, krom la filiojn en Stokholmo kaj Goteborg la Sveda-Ĉina Amikeca Asocio fondis laborajn grupojn en aliaj 11 urboj. Post sia vizito al Ĉinio en la pasinta somero, la delegacio de la Sveda-Ĉina Amikeca Asocio aranĝis pli ol 100 raportajn kunvenojn en diversaj lokoj de la tuta lando por prezenti al la sveda popolo siajn vidaĵojn kaj impresojn pri Ĉinio kaj projekciis lumbildojn pri la socialisma konstruado, pitoreskejoj kaj historiaj restaĵoj de Ĉinio.

"Niaj amikoj troviĝas tra la tuta mondo." Ĉie en Okcidenta Eŭropo estas amikoj de la ĉina popolo. Ilia sincera amikeco al la ĉina popolo en florado certe donos abundajn fruktojn.

# Vizito al la Estro de la Agrikultura Kooperativo "Somes"

*Korespondaĵo el Rumanio*

**E**N la antaŭurbo de Satu Mare en la nordokcidenta parto de Rumanio sin trovas la agrikultura produkta kooperativo "Somes" fame konata tra la tuta lando. Ĝia estro nomiĝas Gheorghe Bogza.

Iun tagmezon ni speciale vizitis lin.

Survoje al la nomita kooperativo, la akompananta kamarado de la redakcio de la loka ĵurnalo al ni rakontis: Ekster la pordo de ĉiu ĉambro de la kooperativa oficejo pendas tabuleto anoncanta la oficon de laborantoj. Tamen la tabuleto de la laborĉambro de la kooperativestro pendas en la pordo. Kiam oni demandis Gheorghe Bogza kial li tiel faris, li respondis: "Mi estas kooperativestro, kion ja ĉiuj scias, do estas ne necesa la anonc-tabuleto ekstere. Mi pendigis ĝin interne nur por ke mi mem ĝin rigardu. Vidante ĝin mi konsciiĝas pri mia devo kaj scias kiamaniere mi devas plenumi mian devon kiel kooperativestro."

Kiam ni venis al lia laborĉambro, tie ni ne vidis lin. Iu kooperativano diris al ni: "Ĉu vi volas la estron? Li estas en la bredejo." Tiu diris ankaŭ, ke li ofte estas ne en la oficejo, sed sur kampo aŭ en la bredejo.

En la kooperativa bredejo, ni vidis ĉe la pordo de kokejo altstaturan homon en simpla laborvesto kaj ledaj botoj. Li estis interparolanta kun bredisto. La rumana kamarado diris, ke li estas la kooperativestro kamarado Bogza. Ekvidinte nin, la lasta tuj forte manpremis kun ni kaj diris: "Amikoj, bonvenon al vi!"

Laŭ propono de la mastro ni pririgardis la bredejon. Ĝi estas tre granda kun bredado de kokoj kiel la ĉefa okupo. Nun en ĝi estas 170,000 kokoj, 2,000 ŝafoj, 150 bovoj kaj 130 ĉevaloj. La vicoj de novaj staloj kun arboj kaj floroj ĉirkaŭ si aspektas bele kaj pure. La estro diris al ni, ke tiuj staloj estas konstruitaj de la kooperativanoj mem. La eksterordinare granda superakvo en 1970 detruis preskaŭ ĉiujn malnovajn stalojn de la bredejo. Se oni komisius la konstruan taskon al koncerna kompanio, oni devus longe atendi. Kion fari antaŭ la maifacilo? La membroj de la kooperativo decidis mem fari la laboron per siaj manoj. Kooperativestro Bogza persone faris projekton kaj ĉiuj

kooperativanoj, ĉu viroj aŭ virinoj, ĉu junuloj aŭ maljunuloj, aktive partoprenis la konstruadon. En malpli ol unu jaro, ili konstruis 20 stalojn kaj krome ankaŭ staplon, tenejon de agrikulturaj maŝinoj kaj ĉarpentistan laborejon. Nun la tutan bredejon regas prospereco.

Poste kamarado Bogza rakontis al ni, kiel ili kulturis maizon. Li diris, ke li estas ano el Karpatoj-regiono. Lia patro estas arbohakisto kaj li neniam vidis maizon en sia infanaĝo. Post la liberiĝo de Rumanio li lernis en kolegio agrikulturan scion. Post la diplomigi li unue laboris en iu ŝtata agrikultura entrepreno kaj poste iris al la kooperativo "Somes" kaj tie laboris kiel ĝia estro. Iom post iom li ekamis la agrikulturon. Li donis apartan atenton por resumi sperton en kulturado de maizo multuzebla kaj altprodukta. Ĉiujare dum rikoltado li selektis nombron da grandaj maizospikoj kaj konservis ilin hejme por uzi ilin kiel semon en la sekvanta jaro. Post multjara praktikado li akumulis, kune kun la kooperativanoj, riĉan sperton en kulturado de maizo. En 1971, ili kreis la tutlandan rekordon de pohektara produktokvanto je 8,200 kilogramoj de maizo sur seka kampo.

Kamarado Bogza rakontis al ni sian sperton pri maizkulturado kaj diris el profunda kompreniĝo: "Mallonge dirite, nia sperto estas kombini mondan sciencan kun lokaj naturaj kondiĉoj." Krome li diris, ke en kulturado ili uzis bonan hibridigitan specion, semis en konvena denseco por faciligi maŝinlaboradon kaj aerumon, aplikis sterkon ĉe la radikoj de la plantoj kaj plugis kaj sterkis dum kreskado de la plantoj per ĉevaloj aŭ homoj anstataŭ traktoroj por ne difekti la plantojn.

Nelonge post kiam ni forlasis la kooperativon "Somes" kaj revenis al la ĉefurbo Bukaresto ni informiĝis, ke la Granda Nacia Asembleo de Rumanio honoris la agrikulturan kooperativon "Somes" per unuagrada medalo "Laboro" por laŭdi ĝin pro ĝia alta produkta rekordo de maizo en 1971. Ni kore deziras al kamarado kooperativestro Bogza kaj ĉiuj kooperativanoj ankoraŭ pli grandan sukceson en la estonteco.

**(Raportistoj de Hinhua-novaĵagentejo)**



# Nova Tajdo de Konkura

## Aĉeto de Oro

**L**A prezo de oro en la okcidenteŭropa merkato krute leviĝis foje kaj refoje kreante rekordon depost la Dua Mondmilito. En la sepa de junio, sur la londona, zurika kaj aliaj ĉefaj oraj merkatoj de la kapitalisma mondo la prezo de 1 unco da oro altiĝis ĝis 65 dolaroj, t.e. 70% super la oficiala prezo de 38 dolaroj por 1 unco. Tio spegulis la pluan disvolviĝon de la okcidenta mona krizo kun tiu de la usona dolaro kiel la centro.

Post la Dua Mondmilito, laŭ la interkonsento de la konferenco de Bretton-arbaro okazigita en julio de la jaro 1944 estis fondita la organizo de "Internacia Mona Fonduso" kaj starigita internacia monsistemo kun la usona dolaro kiel la centro, simila al or-deviza sistemo anstataŭ la internacia monsistemo de ora monometalismo, kiu estis detruita de la Unua Mondmilito kaj la kapitalisma ekonomia krizo de la jaro 1929 ĝis la jaro 1933. Laŭ la nova internacia monsistemo inter la usona dolaro kaj oro estis fiksa valora rilato (1 unco da oro kontraŭ 35 usonaj dolaroj) kaj inter la valutoj de aliaj membroŝtatoj kaj la usona dolaro estis fiksita senŝanĝa kurzo; kaj nur la usona dolaro povis ŝanĝi oron. Tiamaniere la usona dolaro fariĝis "monda mono" egala al oro kaj tiel starigis sian hegemonion super la alilandaj valutoj.

Post la Dua Mondmilito, la usona imperiismo furioze kondukas agresan politikon kun la celo efektiviĝi hegemonion en la mondo kaj forkonsumis grandan kvanton da mono eksterlande. Profitante la privilegion ĝuatan de la usona dolaro, la usona monopola burĝaro energie eksportis kapitalon en skalo senprecedenca; enlande ĝi faris la ekonomian militigon, kio alportis al la milita industrio nenormalan disvolviĝon kaj malfortiĝon de iuj civilaj industrioj kaj malignan disvolviĝon de inflacio. Tial multe malfortiĝis la internacia konkurenca povo de la industrio kaj la komerca pozicio de Usono. Rezulte de tiuj kaŭzoj, en la posta periodo de la kvindekaj jaroj estiĝis granda malfavora saldo en la internaciaj spezoj de Usono kaj ĝia rezervata oro senĉese fluis eksterlanden.

Ekde la komenco de la sesdekaj jaroj fojo post fojo eksplodis krizoj de la usona dolaro. En marto de 1968 disfalis la "Internacia Ora Fonduso" starigita de Usono en 1961 kun okcidenteŭropaj landoj altiritaj de ĝi por defendi la usonan dolaron. De tiam Usono ne plu liveris oron al libera merkato tiel ke en la internacia merkato aperis du malsamaj prezoj de oro: la oficiala prezo de oro restas senŝanĝa, sed tiu de la merkato ŝanĝiĝas libere. Kaj sekve detruigis la kredito de la usona dolaro pro tio ke ĝi ne plu povas ŝanĝi oron.

La oro de Usono daŭre fluis eksterlanden pro tio, ke Francio kaj aliaj okcidenteŭropaj landoj ofte aĉetis, per la usonaj dolaroj en siaj manoj, oron el la ŝtata kaso de Usono. En la jaro 1971, kiam senprecedence serioziĝis la krizo de la usona dolaro, la rezervata oro de Usono estis malpli ol dek miliardoj da usonaj dolaroj, sed la usonaj dolaroj fluintaj el Usono eksterlanden jam superis sesdek miliardojn. La usona imperiismo tute ne kapablas pagi tiun internacian ŝuldon kaj senhonte ekludis malhonestan artifikon. Ĝi deklaris ĉesigon de ŝanĝado de usona dolaro kontraŭ oro kaj rifuzis surŝultrigi la devon ŝanĝi usonajn dolarojn kontraŭ oro tiel ke la usona dolaro ne povas ludi la rolon de internacia rezerva mono. Tial ĉiufoje kiam aperas signo de danĝero, oni tuj konkure vendas usonajn dolarojn por aĉeti oron.

La daŭra disvolviĝo de la mona krizo de la kapitalisma mondo pli akriĝis la kontraŭdirojn inter Usono kaj aliaj ĉefaj kapitalismaj landoj. Ĝis nun ne efektiviĝis la intenco de Usono devigi aliajn landojn cedi en komerco kun la celo transigi sian krizon al la lastaj. Kontraŭe, ankoraŭ pli intensiĝis la komerca batalo inter ili por merkato. Senfine daŭros la kvereloj inter Usono kaj ĝiaj "aliancanoj" pro tio, ke Usono obstine insistas pri nerestaro de ŝanĝo de usona dolaro kontraŭ oro ĝis kiam ĝiaj internaciaj spezoj estos en bona stato. Multaj okcidentaj landoj alprenis diversajn rimedojn por opozicii kontraŭ la plago de la eksterusonaj usonaj

# Fariĝu EPĈ-abonigantoj

*Por kontentigi la bezonon de vastaj esperantistaj amasoj, kiuj deziras koni la Ĉinan Popolan Respublikon, kaj ĝustatempe havigi al ili nian monatan esperantan gazeton "El Popola Ĉinio", estas dezirinde, ke ĉiuj lokaj Esperanto-societoj (grupoj) tra la tuta mondo funkcii kiel niaj EPĈ-abonigantoj!*

## Kion faras la abonigantoj?

*Anonci nian gazeton "El Popola Ĉinio" al la lokaj esperantistoj, varbi abonantojn kaj transsendi la abonilojn al la Libroservo de ĈEL, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio*

## La abonigantoj povas ĝui:

- a. 30% rabaton el la abonpago;
- b. senpagan donacon de ĉiuj specimenoj de novaj ĉinaj esperantaj eldonaĵoj (inkluzive la gazeton EPĈ).

**Rekte Kontakto kun la Libroservo de ĈEL!**

**"Regularo de Abonigantoj" akirebla post peto!**

dolaroj. Okcidenteŭropaj landoj de la "Komuna Merkato" faris paŝojn por starigo de "Eŭropa Valuta Alianco" celante al malgravigo de la rolo de la usona dolaro en okcidenta Eŭropo. En la konferenco de la "Organizo por Ekonomia Kunlaboro kaj Disvolviĝo", kiu okazis je la fino de majo en Parizo kun partopreno de 23 landoj, multaj okcidenteŭropaj landoj refoje unuiĝis en opono kontraŭ Usono, tiel ke la lasta tre izoliĝis.

La angla ĵurnalo *Times* montris, ke la okcidenteŭropaj landoj kun Francio kiel ilia ĉefo esprimis en tiu konferenco ke "ili firme decidis ne akcepti kion ajn Usono deziras". Nur se daŭre disvolviĝos la financa krizo de Usono, neeviteble senĉese eksplodos konfuzo kaj ĥaoso en la okcidenta mona merkato kaj pli kaj pli intensiĝos la "mona batalo" kaj "komerca batalo" inter Usono kaj ĝiaj "aliancanoj".



### DIPLOMIĜO DE AFGANAJ KURSOJ LERNANTAJ ŜTONAN SKULPTADON

La diplomiĝa ceremonio por la kursanoj lernantaj lazurŝtonan skulptadon estis okazigita en la Afgana Ministrejo de Mino kaj Industrio, la 22-an de junio.

Lazurŝtono estas gemo produktita en Badakhshan-provinco de Afganio. La ĉinaj gemistoj atingis Afganion en 1967 por helpi tieajn laboristojn lerni la arton de lazurŝtona skulptado. En aprilo de 1970, konstruado de la lazurŝtona skulptejo komenciĝis kun la ĉina kunlaborado.

Post dujara lernado, la afganaj laboristoj jam tute ellernis la teknikon de la skulptado.

Mohammad Yaqub Lalee, la afgana ministro de mino kaj industrio, kaj la ĉina ambasadoro Hie Bangĝi faris paroladon respektive ĉe la ceremonio. Ili esprimis la esperon, ke la tradicia amikeco kaj amikeca kunlaborado inter la du landoj konstante disvolviĝos.

### LA UNUA CERAMIKA FABRIKO DE ALĜERIO EN FUNKCIADO

En la 20-a de junio, estis okazigita la ceremonio de ekfunkciado de la unua ceramika fabriko de Alĝerio kiun prezidis kaj tondis la rubandon Houari Boumedienne, prezidanto de la Alĝeria Revolucia Konsilantaro.

La fabriko, situanta en la urbo Guelma, Anaba-departemento, en la nordorienta parto de Alĝerio, estis konstruita laŭ la alĝeria-ĉina interkonsento pri ekonomia kaj teknika kunlaborado.

Akompanate de la ĉina ambasadoro Lin Ĝong, Prezidanto Boumedienne kaj aliaj revoluciaj konsilantaraj membroj vizitis ĉiujn laborejojn. Prezidanto Boumedienne faris intiman parolon kun la laboristoj kaj esprimis sian kontenton pri la kvalito de la produktaĵoj.

La Guelma Ceramika Fabriko finis la historion ke kaolino estis forrabita kaj ĉiutage uzataj ceramikaĵoj ĉiuj estis importitaj dum la regado de koloniistoj.

### PRATEMPA VILAĜETO ELTERIGITA EN ĈILIO

Iu pratempa vilaĝeto antaŭ 4,800 jaroj estis elterigita lastatempe de ĉiliaj arkeologoj en la sudo de la haveno Iquique, ĉ. 2,000 kilometrojn norde de la ĉefurbo Santiago.

La vilaĝeto konsistis el 30 duon-subteraj cirklaĵoj kiuj grupiĝas kune en cirklo. Homaj ostoj, malgrandaj instrumentoj, rubaĵoj kaj fragmentoj forlasitaj de tiamaj loĝantoj estis trovitaj en tiuj domoj. Laŭ analizo de arkeologoj, la vilaĝeto estis antaŭ 4,800 jaroj. Ĝiaj loĝantoj ankoraŭ ne scipovis pri agrikulturo kaj ceramiko, sed sin vivtenis per ĉasado, fiŝado kaj kolektado de vegetaĵoj.

Profesoro Lautaro Nunez diris, ke la antikva vilaĝeto kun tiom grava arkeologia valoro estis unuafoje trovita en Ĉilio.

### PRODUKTO DE MALUTILAJ FILMOJ ESTAS MALPERMESATA EN IRANO

La 19-an de junio la ĵurnalo "Kayhan" ("Mondo") raportis, ke la Irana Ministrejo de Arto kaj Kulturo publikigis informon lastatempe: malpermesi produkti filmojn malutilajn por la nacia digno.

La informo diras: "Estas malpermesite en Irano produkti filmon, kiu estas ne en konformeco kun la nacia honoro kaj digno kaj kiu priskribas murdon, rabon kaj vetludon." "Flavaj scenoj kaj trivialaj dialogoj estas malpermesataj en ĉiuj filmoj."

Ĝi vokas al ĉiuj iranaj filmaj direktoroj, geaktoroj kaj scenaristoj kaj aliaj filmolaboristoj oponi kontraŭ malutilaj kaj venenaj filmoj.

## Sur la kovrilo:

Ujgura danco de Hingiang  
"Festo de Riĉa Rikolto"

## Sur la dorskovrilo:

Gimnastiko kolektiva de pekinaj  
mezlernejoj

EL POPOLA ĈINIO 人民中國新道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

**N-ro 9 (170) 1972**

## Ĉefa Enhavo

Unuiĝo, Konkurso kaj Progreso.....	1
Korbopilka Ludo en Montvilaĝo kaj Ĉevalkonkurso sur Stepo.....	9
Tabloteniso en Landlima Monturbo.....	12
Pli-ol-2000-jara Antikva Tombo Ĵus Malkovrita .....	15
Sujongĝabu — Bona Kondukanto en Stepa Konstruado... ..	21
Por Disvolviĝo de Nia Ĝardenistiko.....	25
Ŝpardepono de Liberigitaj Servutuloj de Tibeto.....	27
Nova Fizionomio de la Regiono de Fuĉun-rivero.....	28
Ĉina Kverka Silkaĵo.....	32
Jen Poploj kaj Salikoj ( <i>poemo</i> ) .....	34
Malgranda Sonoriganto ( <i>literaturaĵo por geknaboj</i> ) .....	35
Ĉanghe — Produktejo de Pajlaj Ĉapeloj.....	38
Ŝuoj Eksterordinare Grandaj .....	41
Profunda Amikeco de la Popoloj de Okcidenta Eŭropo al la Ĉina Popolo .....	42
Vizito al la Estro de la Agrikultura Kooperativo "Somes" ...	44
Nova Tajdo de Konkura Aĉeto de Oro.....	45



# Vigla Disvolviĝo de Amasa Sporta Aktivado



Junulinoj de la Universala Maŝin-fabriko de Ĉungking, Siĉuan-provinco, faras sportan aktivadon por la revolucio. Ili estas kaj lertulinoj en produktado kaj aktivulinoj en sporto.




Kore-naciecaj virinoj de Janbian de Gilin-provinco faras sportan aktivadon ŝatatan de la koreanoj.









Milicanoj de Bejling-komunumo de Haj-an-gubernio de Giang-su-provinco sin ekzercas en transiro de soltrunka ponteto.





Infanoj de la Unua Infangar-  
eno de la urbo Gangiang de  
Guangdong-provinco sin su-  
sumas.

Trejnistro de salto kun stango  
de Fugian-provinco instruas  
al knaboj fundamentan tekni-  
kon de tiu sporto.



Ŝnurtiro jam fariĝis unu el la ŝatataj  
sportoj de nacimalplimultoj de Guj-  
ŝou-provinco.





Instruisto de la elementa lernejo Heping de Huajde-gubernio de Gilin-provinco instruas al lernantoj ludon de piedpilko.

Gimnastiko

La Libertempa Sportolernejo de Ginan, Ŝandong-provinco, kulturaj sportistinojn de la ĉina tradicia skermado.





